

ASISTILO

n-ro 17

Aŭtuno 1995 Automne

Revue de religion comparée bilingue (espéranto et français) / Religikompara revuo
Association Internationale d'Etude des Enseignements Spirituels et Théologiques


ASISTI : Asocio de Studado Internacia pri Spiritaj kaj Teologiaj Instruoj

Neŭtrala asocio kunlaboranta kun TEL (Tutmonda Ekumena Ligo), JBLE (Japana Budhana Ligo Esperantista),
OKEJ (Ortodoksa Klubo de Esperantaj Judoj), U.E.A., WCRP (World Conference on Religion and Peace).
Membro-grupo de IARF (International Association for Religious Freedom) / Internacia Asocio por Religia Libereco)



Dum la *Interreligia Seminario*
en Szombathely. De dekstre : Ch.
Lavarenne, M. Howard, B. Moro,
M. Mirbaghian, G. Fritzsche, E. Tóth.

La 50-jariĝo de la
Unuiĝintaj Nacioj



Enkidu, argilajo kaj
el la II-a jarmilo a.K.
trovita en *Ur* (Bagdada Muz.)

Gilgameŝ, la heroo de la *Epoepo*, luktanta kun leono
Stampaĵo de cilindro el *Mari* el la dua duono de la III-a jarmilo a.K.
(*British Museum*)

Vorto de la redaktoro

Komisiita de ASISTI-kunvenantaro en Szombathely (vidu sur p.13), la ASISTI-sekretario (kaj redaktoro) **alvokas kandidatiĝojn al la postenoj de Sekretario kaj Prezidanto de ASISTI** (oni rapide anonciĝu kaj sendu memprezenton al la red.)

Celebre al la 50-jariĝo de Unuigintaj Nacioj ni tradukis ties *Deklaracion pri maltolero kaj diskriminacio pro religio aŭ kredo*, kies datrevenon « ni » festis ĉe UN pere de IARF, la *Internacia Asocio por Religia Libereco*, kies membro ASISTI estas. Vi legos pri UN en kelkaj aliaj artikoloj...

La redakto de *Asistilo* fariĝis preskaŭ inter-religia centro ĉi-somere (vidu p.25), tial ni pardonpetas pri la malfruoco de tiu ĉi numero...

Per miaj novaj brokanta komputilo kaj lasera printilo mi esperas ke de nun mi pli facile kaj rapide redaktos, kvankam mi devas alkitimiĝi al nova tekstprilaborilo*. Pro la akĉeto mi devis rezigni la UK-on en Tampere kaj taoisman antaŭkongreson en Pollando kun Bradia Moro...

* De nun vi povos do sendi viajn artikolojn ktp. en formo de dokumentoj en *Word.6* (aŭ kongruaj : *Word Perfect...*) sur disketoj (3 1/2), plie de la surpapera kutima formo : tiel mi ŝparos la enkomputiligan retajpadon.

Ligila Organo de ASISTI (Asocio de studado internacia pri spiritalaj kaj teologiaj instruoj) ĉ. trimonata
Red. : Presbytere, F-09800 Balagué (Tel +33 61 04 70 66)

ASISTI-estraro: Prez. Yosimi Umeda - Bradia Moro : kasisto - Ch. Lavarenne : sekr. k vickas. - Pavla Dvoráková (kaj B. Westerhoff ?) : kunvenoj - F. Degoul : eksteraj rilatoj - Leif Nordenstorm : Religia Antologio

Directeur de Publication : Christian Lavarenne

Jarabono : triono de UEA-individua abono (MA), t.e. 100ff / 32gld / 29DM / 18\$ (duonpreze por malriĉaj l.) al :

— franca poŝtkonto *Asistilo*, n-ro 1042177R Marseille

— UEA-konto asis-r

— FEL-konto clvr-n

— norvega *postgiro*: Ch. Lavarenne n-ro 0540-7849940

— Marek Krański, ul. Albanska 28/2, PL-60 134 Poznan

— aŭ B. Moro, Srytka 147, PL-47-220 Kedzierzyn-Kozle

Subtena abono : ekde 150 ff / 50 gld / 50 DM / 30 \$...

Abonhelpa fonduso : pliaj abonoj laŭ la tarifoj valida por vi mem ; vi rajtas indiki la adresojn de la ricevantoj...

ASISTI-kotizo 1996 : deviga por esti membro, kiu ajn ĝi estu (sed minimume kvarono de la UEA-MJ : 9,5gld, por okcident-Eŭropo, norda Ameriko, Japanio)

Subtena membro : ekde 200ff / 70 gld / 70 DM / 40\$

...Ne forgesu kontribui, koran dankon !

Enhavo

- Kuraĝigo al ASISTI, de Isabelle Nicolas, budhista sekr. de regiona E-grupo (F) p. 3
- UNA Deklaracio pri eliminado de maltolero kaj diskriminacio pro religio aŭ kredo p. 4
- Datreveno de la Deklaracio festita de IARF (kaj Komitato de religiaj NROj) ĉe UN (USA) p. 5
- Malliberigita reenkarnejo :** la Panĉen-Lamao, dua ĉefo de *vagrajana* budhismo p. 6
- Tibetanoj deziresprimas **bonan naskiĝdatrevenon al UN** (USA) p. 7
- Kunlabore kun UN:* La Granda Alpreĝo, de Steve Nation (*World Goodwill*, GB) p. 7
- Granda Unueca Kredo*, de Jebumo (Ĉinio) — fino (?) p. 8
- La Serio pri Gilgameŝ*, de Sinleqe'unnenni (**Asirio, XII-a jc. a.K. ?**) p. 9
- Raportoj :** Internacia Simpozio pri **Ŝintoo** kaj Japana Kulturo, de Yosimi Umeda (J) p. 12
- 2-a *Interreligia Seminario Esperantista* (de ASISTI) en Hungario p. 13
- La Serĉado de l' Gralo :* Rakonto pri la mirakla ŝildo (romanika romano el la XIII-a jc.) p. 14
- Patriarkoj kaj Papoj** (Vatikano, Armenio, Rusio, Hungario, Egiptio) p. 17
- Dominikaj teologoj : Congar, de H. Küng (D), kaj Chenu, de L. Bourdon o.p. (F) p. 18
- Jogosutro de Patanĝali (IV-a jc. a.K.), kun komentarioj de Vjaso (Bharato) p. 20
- Oomoto kaj Esperanto, de AGOU Takaŝi (J) p. 24
- Publika letero* al la **Kataroj**, de Marie-Ange (Okcitanio) p. 25
- Letero de leganto pri **Gnostikoj :** *Helpu ! Oni sieĝas min*, de Renato Corsetti (I) p. 25
- Kolombia « *taoista majstro* » de Werphaplus — fino (?) p. 26
- Dua falo de la homaro* laŭ la *Ora Rozokruco*, de J.G. Ibars (E) — sekvo p. 28
- Pri **pluekzistado de ASISTI**, de B. Westerhoff (D), P. Dvoráková (CZ) kaj la red. p. 29
- Paĝo sub la respondeco de OKEJ : *Ortodoksa Klubo de Esperantaj Judoj* (Israelo) p. 30
- Anoncoj : *La japana budhano* ; kaj *Nuntempaj spiritalaj mesaĝoj* de F. Degoul (F) p. 31
- 3-a *Interreligia Seminario Esperantista* en Ĉeĥio somere 1996 (*unua bulteno*) p. 32

Post legado de *Histoire d'ASISTI**

Kun entuziasmeo mi ĵus ekkonis la historion de ASISTI. Post tiu legado mi sentas la bezonon turni min al kiel eble plej granda nombro da homoj. Tial, indiferente ĉu ili jam/aŭ ankoraŭ ne konas la celon de ASISTI, mi tuj rapide rememorigas ĝin, kaj ĉiu tiam komprenos la kialon de tiu ĉi spontanea impeto mia.

ASISTI naskiĝis la 1-an de aŭgusto 1989 dum la Universala Kongreso de Esperanto en Brighton (Anglio). Ĝia ĉefa celo estas kunordigi la agadojn de la diversaj esperantistaj religiaj (aŭ piriteligiaj) asocioj. Kaj, ampleksige, ĝia agado estas :

- diskonigi ĉefe per esperantaj tradukoj spiritaĵajn tekstojn de diversaj religiaj tradicioj kaj spiritaĵajn instruojn de nuntempaj saĝuloj kaj majstroj,
- helpi al organizado de esperantistaj spiritaĵaj renkontiĝoj,
- informi pri aktualaj kaj praktikaj demandoj, pri spiritaĵaj komunumoj, movadoj, renkontiĝoj...

Ĉar ASISTI signifas *Asocio de Studado Internacia pri Spiritaĵaj kaj Teologiaj Instruoj*, ĝi do estas je la servo de vasta internacia aro da gehomoj laborantaj por la reproximiĝo kaj reciproka kompreno de la religioj, kaj do fariĝis la heredito de longa kaj riĉa pasinto devenanta de Zamenhof kaj lia ideo pri homaranismo.

La ĉefa afero al kiu Zamenhof dediĉis sian tutan vivon estis tiu de la Unuiĝo de l'Homaro. Hodiaŭ, se kiel esperantistoj (sed ne nur) ni vere deziras labori por la daŭrigado de tiu nobla ideo, ni devas serioze pripensi kiel ni plej bone povos atingi tion.

Ĉiu ago, kiel ajn malgranda ĝi estas, farita kun tiu intenco, povas esti kvalifikita kiel nobla, bonefika, konstruiga... Ni tamen devas ekkonscii ke bedaŭrinde ni ankoraŭ apartenas al tiuj minoritataj movadoj multe tro ofte kvalifikitaj kiel marginaj, kaj mi tute dezirospiras ke kune, en baldaŭa estonteco, ni estos kapablaj fari mensogulojn ĉiujn kiuj traktis nin kiel neseriozulojn.

Hodiaŭ, por esti pli fortaj kaj pro nia volo vidi la homaron unuigi, nur per reunuiĝo de ĉiuj esperantistoj kaj de ĉiuj kiuj volas kuniĝi al ili, ni povos fariĝi konvinkaj. Kiam mi diras *konvinkaj*, neniel temas pri konvinkado de iu, sed nur pri elmontrado per nia sinteno ke ni akordiĝas kun kion ni rekomendas, kaj ĝuste tiu kongruo estos nia forto, nia kredindilo.

Havanta ioman konon de la esperantista medio, mi povis konstati ke ekzistas amaso da gehomoj kiuj havas bonegajn ideojn, sed ke ĉiujfoje ili restas izolitaj. Ĉu vi pensis pri kion vi valoras sola en via anguleto, kun viaj bonaj ideoj, kaj kion vi povos *kune* fari per viaj cerboj kaj brakoj ?

Nun kiam unuflanke la mondo disŝirigas kaj aliflanke landoj provas unuigi, kion ni povos proponi, kiel esperantistoj ? Se jam morgaŭ oni faros tiun ĉi demandon, kaj se la tiel nomataj *Grandaj Regantoj* kalkulos je ni, kion ni respondos ? Ĉu ni havas ion konkretan por proponi ? Ĉu ni povos preventi, kiel modelon, fortan kaj unuigitan organizon ? Se jes, kiun ?

Karaj geamikoj, mi petas ke vi helpu min, ke vi donu al mi informojn kaj ideojn, kaj ke vi reciproke aŭskultu viajn respondojn. **Mi etendas manon al vi : se nur unu persono prenos ĝin, lia alia mano certe trovos alian** kiun li povos firme teni, kaj tiel plu... Ni donu niajn manojn unu al la aliaj kaj ni tre rapide povos transpasi ĉiujn limojn kiuj ĝis nun staris obstakle sur niaj vojoj. Ni tiam fariĝos konvinka, unuigita kunaĵo, laboranta por la unuiĝo de l'homaro.

Ĉu mi bezonas parenteze precizigi ke unueco neniel rilatas kun unuformeco ? Kiel diris Baha' u'llah, oni devas realigi la *« unuecon en diverseco »*. Al kiuj ajn religioj, konfesioj ni apartenas, ni povas, se ni tion volas, konsistigi tiun Unuecon en Diverseco, kunigante sub Komuna Tegmento kie ĉiu el la ĉambroj havus sian propran identecon kvankam estante parto de la domo. Ekzemple domo estas nomata domo ĉar ĝi enhavas plurajn ĉambrojn kiuj nomiĝas kuirejo, banĉambro, salono, sed se oni apartigas ekzemple kuirejon, oni ne plu povas nomi ĝin domo : tio ne plu signifas ion ekster la tutaj ; sed kunigante ĉiujn ĉambrojn ni finfine povos vidi la domon tia kia ni ĝin deziras.

Ĉu ni povas unte doni al ni kiel komunan projekton konstrui la fundamentojn de tiu domo ? ASISTI, kiu jam multe laboris, jam estas laŭ mi la unua ŝtonego kiu ebligas al tiuj fundamentoj rapide stariĝi. **Sufiĉas nun ke ĉiu alportu sian ŝtonon**, eĉ ŝtoneton, kaj granda konstruaĵo povos tre baldaŭ naskiĝi.

Sen pretendi esti aŭ fariĝi la konstruantoj de la paco, mi tamen sincere kredas, per ĉiuj miaj fortoj, ke ni povos multe kontribui al tio ; se ne, mi devus, sola, kuraci min de miaj ideoj, tutsimple provante forgesi ilin.

Isabelle Nicolas

Budhista sekr. de Limoĝia E-grupo

* 10-paga, franclingva, havebla ce la red.

Unuiĝintaj Nacioj : *Deklaracio pri eliminado de ĉiuj formoj de maltolero kaj de diskriminacio bazitaj sur religio aŭ kredo*

Akceptita de la Ĝenerala Asembleo la 25-an de novembro 1981 (Rezolucio 36/55)

La Ĝenerala Asembleo,

Konsiderante ke unu el la bazaj principoj de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj estas tiu de la digno kaj egaleco esencaj al ĉiuj homoj, kaj ke ĉiuj Ŝtatoj-Membroj engaĝiĝis kune kaj aparte agi, en kunlaboro kun la [UN-a] Organizo, por disvolvi kaj kuraĝigi universon respektan kaj observon de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj por ĉiu, sen distingo pri raso, sekso, lingvo aŭ religio ;

Konsiderante ke la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj kaj la Internaciaj Konvencioj pri Homaj Rajtoj proklamas la principojn de nediskriminacio kaj egaleco antaŭ la leĝo kaj la rajton je libereco de opinio, konscienco, religio kaj kredo ;

Konsiderante ke la neglektado kaj malobservo de homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj, ĉefe de la rajto je libereco de opinio, konscienco, religio aŭ ia ajn kredo, rekte aŭ nerekte alportis milojn kaj grandan suferon al la homaro, speciale kiam ili servas kiel ilo de eksterlanda enmiksiĝo en la internajn aferojn de aliaj Ŝtatoj kaj entute estas eksicito de malamo inter popoloj kaj nacioj ;

Konsiderante ke religio aŭ kredo, por kiu ajn konfesas unu aŭ la alian, estas unu el la fundamentaj elementoj en lia vivkoncepto, kaj ke la libereco de religio aŭ kredo devus esti plene respektata kaj garantiata ;

Konsiderante ke estas esence disvolvi komprenon, toleron kaj respekton en kio rilatas kun la libereco de religio aŭ kredo, kaj certigi ke la uzo de religio aŭ kredo por celoj neakordigeblaj kun la Ĉarto, aliaj taŭgaj iloj de UN kaj la intencoj kaj principoj de tiu ĉi Deklaracio estas netolerebla ;

Konvinkita ke la libereco de religio kaj kredo devus ankaŭ kontribui al la atingado de la celoj de monda paco, socia justeco kaj amikeco inter la popoloj, kaj al eliminado de ideologioj aŭ praktikoj de koloniismo kaj rasa diskriminacio ;

Notante kun kontenteco la akcepton de pluraj, kaj la aplikadon de kelkaj, konvencioj, sub la egido de UN kaj de fakaj agentejoj, por la eliminado de diversaj formoj de diskriminacio ;

Koncernita de la manifestiĝoj de maltolero kaj de la akzisto de diskriminacio pro religio aŭ kredo ankorau videbla en iuj areoj de la mondo ;

Decidiĝinte akcepti ĉiujn necesajn dispoziciojn por la rapida eliminado de tia maltolero en ĉiuj ties formoj kaj manifestiĝoj, kaj preventi kaj kontraŭbatali la diskriminacion pro religio aŭ kredo ;

Proklamas jenan Deklaracion pri la eliminado de ĉiuj formoj de maltolero kaj de diskriminacio bazitaj sur religio aŭ kredo.

Artikolo 1

1. Ĉiu havas la rajton je libereco de opinio, konscienco kaj religio. Tiu ĉi rajto inkluzivas la liberecon havi religion aŭ ian ajn kredon laŭ sia elekto, kaj la liberecon, aŭ individue aŭ en komuneco kun aliaj kaj publike aŭ private, manifesti sian religion aŭ kredon en kulto, observo, praktikado kaj instruado.

2. Neniu estos elmetata al trudado kiu difektus lian liberecon havi religion aŭ kredon laŭ sia elekto.

3. La libereco manifesti sian religion aŭ kredojn povas esti elmetata nur al tiaj limigoj kiaj ili estas preskribitaj per leĝo kaj necesaj por protekti la publikajn sekurecon, ordon, sanon aŭ moralan aŭ la fundamentajn rajtojn kaj liberecojn de aliaj.

Artikolo 2

1. Neniu estos elmetata al diskriminacio de iu ajn Ŝtato, institucio, grupo de personoj aŭ persono pro religio aŭ aliaj kredoj.

2. Por la celoj de tiu ĉi Deklaracio, la esprimo «maltolero kaj diskriminacio bazitaj sur religio aŭ kredo» signifas ian ajn distingon, ekskludon, restriktion aŭ preferon bazitan sur religio aŭ kredo kaj havantan kiel sian intencon aŭ kiel sian efikon neniigon aŭ difekton de la rekonno, ĝuo aŭ uzo de homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj sur egala bazo.

Artikolo 3

Diskriminacio inter homoj pro religio aŭ kredo konsistigas ofendon al la homa digno kaj malagnoskon de la principoj de la Ĉarto de UN, kaj estos kondamnata kiel rompo de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj proklamitaj en la *Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj* kaj detale formulitaj en la Internaciaj Konvencioj pri Homaj Rajtoj, kaj kiel obstaklo en la amikaj kaj pacaj rilatoj inter la nacioj.

Artikolo 4

1. Ĉiuj Ŝtatoj prenos efektivajn dispoziciojn por preventi kaj elimini la diskriminacion pro religio aŭ kredo en la rekonno, uzo kaj ĝuo de homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj en ĉiuj kampoj de la civila, ekonomia, politika, socia kaj kultura vivo.

2. Ĉiuj Ŝtatoj faros ĉiujn strebojn por apliki aŭ revizii la leĝaron kie necesas por malpermesi tian diskriminacion, kaj por preni ĉiujn taŭgajn dispoziciojn por kontraŭbatali la maltoleron pro religio aŭ aliaj kredoj pri tiu ĉi temo.

Artikolo 5

1. La gepatroj aŭ, kiel tio povus esti la kazo, la kuratoroj de la infano havas la rajton organizi la vivon ene de la familio en akordo kun sia religio aŭ kredo kaj gardante en la menso la moralan edukadon per kiu ili kredas ke la infano devus esti edukata.

2. Ĉiu infano ĝuos la rajton je alirebleco al edukado pri religio aŭ kredo en akordo kun la deziroj de siaj gepatroj aŭ, kiel tio povus esti la kazo, kuratoroj, kaj ne estos altrudita ricevi instruadon pri religio aŭ kredo kontraŭ la deziroj de siaj gepatroj aŭ kuratoroj : la plej granda profito por la infano estos la gvida principo.

3. La infano estos protektata kontraŭ ia ajn formo de diskriminacio pro religio aŭ kredo. Li estos edukata en spirito de komprenemo, toleremo, amikeco inter popoloj, paca kaj universala frateco, respekto al la libereco de religio aŭ kredo de aliuloj, kaj en la konscio ke liaj energioj kaj talentoj devus esti dediĉitaj al la servado de siaj homaj fratoj.

4. En la kazo de infano kiu ne estas sub la zorgado de siaj gepatroj aŭ kuratoroj, konsiderendaj estos iliaj esprimataj deziroj aŭ iaj ajn pruvoj de iliaj deziroj pri religio aŭ kredo : la plej granda profito por la infano estos la gvida principo.

5. Praktikoj de religio aŭ kredo en kiuj infano estas edukata devas ne esti malutilaj por lia fizika aŭ mensa sano aŭ por lia plena disvolvigo : konsiderenda estas la artikolo 1, paragrafo 3, de tiu ĉi Deklaracio.

Artikolo 6

En akordo kun la artikolo 1 de tiu ĉi Deklaracio, kaj submetite al la klaŭzoj de la artikolo 1, paragrafo 3, la rajto je libereco de opinio, konscienco, religio aŭ kredo inkluzivos, inter aliaj, la jenajn liberecojn :

a/ Kulti aŭ kunveni en rilato kun religio aŭ kredo, kaj fondi kaj konservi lokojn por tiuj ĉi celoj ;

b/ Establi kaj konservi taŭgajn helpemajn aŭ homamajn instituciojn ;

c/ Fabriki, akiri kaj uzi ĝis adekvata mezuro la necesajn aĵojn kaj materialojn rilatajn al la ritoj aŭ kutimoj de religio aŭ kredo ;

d/ Verki, eldoni kaj disvastigi konvenajn publikigaĵojn en tiuj ĉi kampoj ;

e/ Instrui religion aŭ kredon en lokoj taŭgaj por tiuj ĉi celoj ;

f/ Peti kaj ricevi libervolajn financajn kaj aliajn kontribuaĵojn de individuoj kaj institucioj ;

g/ Trejni, dungi, elekti aŭ nomumi kiel posteulojn taŭgajn gvidantojn vokitajn per la bezonoj kaj kriterioj de iu ajn religio aŭ kredo ;

h/ Observi senlaborajn tagojn kaj celebri festotagojn kaj ceremoniojn en akordo kun la preceptoj de sia religio aŭ kredo ;

i/ Starigi kaj daŭrigi komunikaĵojn kun individuoj kaj komunumoj pri religio kaj kredo sur la nacia kaj internacia niveloj.

Artikolo 7

La rajtoj kaj liberecoj formulitaj en tiu ĉi Deklaracio estos akorde inkludigitaj en la naciajn leĝarojn laŭ tia maniero ke ĉiu povos praktike profiti de tiaj rajtoj kaj liberecoj.

Artikolo 8

Nenio en tiu ĉi Deklaracio povos esti interpretata kiel alportanta restrikton aŭ escepton el iu ajn rajto difinita en la *Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj* kaj la Internaciaj Konvencioj pri Homaj Rajtoj.

Datreveno de la Deklaracio festita ĉe UN lastjare

Kiel Ne-Registara Organizo (NRO) akreditita ĉe la UN-a sidejo en Novjorko, IARF [*Internacia Asocio por Religia Libereco*, kies membro ASISTI estas] rajtas havi sep reprezentantojn, el kiuj ĉiu partoprenas en la NRO-procezo laŭ multaj manieroj (...) Ili ankaŭ ĉeestas specialajn renkontiĝojn tiajn kia la « *Tago por Libereco de Religio aŭ Kredo* » okazinta ĉe la UN-a sidejo la 17-an de novembro 1994.

La Komitato de la NROj pri *Libereco de Religio aŭ Kredo*, prezidata de IARF-representantino, Sue Nichols, patronis, kune kun la Komitato de la religiaj NROj ĉe UN, tiun ĉi specialan tutagan eventon, organizitan por festi la datrevenon de la UN-a proklamo de la Deklaracio. Ĉeestis multaj membroj de religiaj NROj, kaj reprezentantoj de vasta gamo el aliaj NROj.

La programo komenciĝis per parolado ĉe la ĉiusemajna informkunveno (de la UN-a Publik-Inforna Fako) por NROj, parte retrospektiva, kiu i.a. menciis la starigon de Speciala Raportisto pri la Eliminado de ĉiuj formoj de maltolero kaj de diskriminacio bazitaj sur religio aŭ kredo, por garantii ke la Deklaracio havos la rimedon efiki (...)

Poste P-ro Luis Dolan, Prezidanto de la Komitato de la religiaj NROj ĉe UN*, parolis pri la maniero laŭ kiu la NROj povas kunlabori kiel partneroj kun UN por disvolvi toleran kaj liberecon de religio aŭ kredo. Li priskribis la gravan progreson de la interreligia dialogo sur la institucia kaj esplorada niveloj sed li ankaŭ atentigis pri la neceseco venigi tiun ĉi antaŭeniron sur la bazan nivelon. Li plu parolis pri necesa kunlaboro inter la NROj...

Sekvus du rondo-diskutoj pri nuntempaj religiaj streĉitecoj kaj ŝtupoj al ilia solvo (...)

Por simbolo la eblecon de religia harmonio, la tago finiĝis per interkreda ceremonio en la Kapelo de la *Eklezia Centro por UN*. Kunkune reprezentantoj de kristanaj, hindua, indiĝen-religiaj kaj islama kred-komunumoj portis tradiciajn simbolojn de siaj religioj en la kapelon. Kaj tio estis sekvata de kantoj, laŭlegadoj kaj liturgiaj dansoj celebrantaj la idealojn de reciproka respekto kaj kompreno.

Laŭ kunvenaj notoj de Sue Nichols IARF-representantino ĉe UN

* Kaj unu el la ĉefaj organizintoj de la « *Sarva-dharma-sammelana* » (vidu *Asistilon* n-ro 13, p.22-26 kaj n-ro 14, p.4) : li gvidis la « Programon I » en kiu partoprenis la ASISTI-sekretario. Li ŝajnis sufiĉe favora al esperanto, eĉ se el plurpaĝa kontribuajo nur ununura frazo restis en la 365-paĝa raporto, sub la rubriko « *Ideal Visions of Interfaith Cooperation* » : « 10.11 *Everybody has a second common language (Esperanto) so there is greater understanding.* » (Idealaĵ revoj pri interkreda kunlaborado : 10.11 *Ĉiu havas duan komunan lingvon (Esperanto), tiel estas pli granda [inter]kompreno* ; en *Visions of an Interfaith Future : Proceedings of Sarva-Dharma-Sammelana*, ed. by Celia and David Storey, Oxford : International Interfaith Centre, 1994, p.65.

Malliberigita reenkarniĝinto : la dua ĉefo de la vaĝrajana budhismo



En majo 1995 la 6-jara Gedün Ĉhökji Njima estis oficiale rekonata de la Dalai-Lamao kiel la 11-a reenkarniĝinto de la Paŝĉhen-Lamao¹. Sed tuj poste li malaperis, kaptita kun sia familio de ĉinaj policistoj. Jen provo de rakonto de tiu ĉi kvazaŭ-romano, kvankam la suferoj de la tibetaj roluloj estas bedaŭrinde tute realaj.

(Re)naskiĝinta en 1938, la deka Paŝĉhen-Lamao forpasis «*pro kormalsano*» en januaro 1989 en Taŝilumpo, sia monaĥejo en Ŝigatse, post inaŭguro de granda stupao kien li metigis siajn 5 antaŭajn korpojn². Kaj la 25-an de aprilo de la sama jaro en Lhari (Nagĉhu-provinco) Deĉhen Ĉhodon naskis Gedün Ĉhökji Njima, kies patro nomiĝas Konĉhok Phuntsog.

Post la malapero de la deka Paŝĉhen-Lamao, Ĉhadrel Rinpoĉhe (de la monaĥejo Doser), kiu antaŭe estis invitita de la Paŝĉhen-Lamao translokiĝi en Taŝilumpo, fariĝis la (provizora) abato de lia ĉefmonaĥejo. Por serĉi la reenkarniĝinton, la ĉinaj aŭtoritatoj starigis religian komitaton, oficiale prezidata en 1993 kaj 1994 de la sama Ĉhadrel Rinpoĉhe, kiel abato de Taŝilumpo. En julio 1993, okaze de oficiala akceptado en Pekino de tibeta delegacio kies ĉefo estis la frato de la Dalai-Lamao, Gĵalo Thondup, la ĉina registaro adresis (oficialan ?) peton al la Dalai-Lamao por ke li partoprenu en la serĉado. Kaj el pluraj proponitaj infanoj, Gedün Ĉhökji Njima estis inter tiuj kiuj plenumis la postulojn de la oficiala Komisiono.

Sed serĉa komitato estis «*starigita de la religiaj aŭtoritatoj en Tibeto mem*» (t.e. preskaŭ certe sendepende de la Komunista Partio kaj en akordo kun la Dalai-Lamao). Kaj la sama Ĉhadrel Rinpoĉhe korespondis pri tio kun la Dalai-Lamao, tre diskrete se ne tute sekrete (t.e. sen averti la lokan? ĉinan registaron). Laŭ la tradicio tiu ĉi komitato konigis siajn rezultojn rekte al la Dalai-Lamao, al kies ekzila restadejo en Dharamsala ĝi venis por partopreni kun li en la ekzamenado kaj divenado por certigi pri la reenkarniĝinto.

La Dalai-Lamao faris la oficialan finan deklaron en la festo de Vajŝakho, la datreveno de la naskiĝo de la Budho³. Temas pri la sama knabo jam duonakceptita de la Komisiono (pli malpli sub ĉina kontrolo).

1/ Pri la deka reenkarniĝinto, vidu JL Liang, «*Karme-mo* al Majstro la Deko Baingĉen», kun 4 nigrablankaj fotoj, en *El Popola Ĉinio*, n-ro 368 (majo 1989), p.12-14.

2/ Ĉar li ankaŭ estis «*vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso*» (kaj prezidanto de la «*Konstanta Komitato de la Prepara Komisiono por la Tibeta Aŭtonoma Regiono*»), prezidis la funebran ceremonion, la 15-an de februaro, la tiam «*prezidanto de la Ŝtato, Yang Ŝangkun*». (el la supre referencita artikolo.)

3/ Sanskrite *vajŝakhi paŭrnamasī* : la plena luno de la monato vajŝakha.

Deklaro de la Dalai-Lamao pri la reenkarniĝo

Hodiaŭ estas la bonaŭspicia tago kiam unuafoje la Budho instruis Kalaĉakron. La instruo pri Kalaĉakro havas apartan ligan kun la Paŝĉhen-Lamaoj. Sub do tiu favora aŭspicio, kiam ni ankaŭ festas Vajŝakhon, kun granda ĝojo mi povas anonci la reenkarniĝon de la Paŝĉhen Rinpoĉhe (...)

Dum tiuj ĉi lastaj jaroj mi tre zorge plenumis ĉiujn taŭgajn religiajn procedurojn kaj preĝegis la Tri neeraripovajn Juvelojn*.

Mi estas perfekte konvinkita pri la tute fidinda rezultato de ĉiuj tiuj rekonaj proceduroj, plenumitaj en strikta konformeco kun nia religia tradicio. Mi donis al la Rinpoĉhe la nomon «*Tenzin Gedün Jeŝe Trinlej Phuntsog Pel Sangpo*» kaj mi verkis preĝon por lia longa vivo, titolitan «*La spontanea plenumiĝo de la deziresprimoj*».

La serĉado kaj rekono de la reenkarniĝinto de la Paŝĉhen Rinpoĉhe estas religia afero, ne politika. Mi havas la esperon ke la ĉina registaro kun kiu mi restis en kontakto pri tiu ĉi temo pere de diversaj kanaloj dum la lastaj jaroj, manifestos sian komprenemon, sian kunlaboradon kaj sian helpon al la monaĥejo Taŝilumpo permesante al la Rinpoĉhe ricevi la religian trejniĝon kiu taŭgas por ebligi al li plenumi siajn spiritalajn respondecojn.

* Sanskrite *triratna*, t.e. Budho, Dharmo kaj Sangho, en kiuj ĉiuj budhanoj rifuĝas.

Do ĉio en ordo ? Ne, ĉar la ĉina registaro ne kapablis sukcese enmiksiĝi en la afero : nur tri tagojn post la publika deklaro de la Dalai-Lamao, la Abato de Taŝilumpo Ĉhadrel Rinpoĉhe estis arestata kun sia asistanto kaj sekretario Ĝampa Ĉungla. Kaj laŭdire li eltenis «*fortajn premojn por ke li malagnosku la elekton de la Dalai-Lamao*»⁴. Kaj preskaŭ milo da soldatoj ĉirkaŭis la urbon Ŝigatse kaj la monaĥejon.

Ankaŭ la 6-jara knabo estis «*forrabata*»-kun sia familio, ŝajne laŭ decido de «*la militistaj aŭtoritatoj de Ĉina Popola Respubliko*»⁵, kaj verŝajne kondukata al Pekino kiel «*la plej danĝera prizonulo de Ĉinio*»⁶.

Pro la necedemo de Ĉhadrel Rinpoĉhe, ankaŭ la monaĥoj de Taŝilumpo estis minacataj, por ke ili malaprobu sian abaton. Tiu premo vekis reagon, kaj en la monaĥejo estis afiŝataj proklamoj asertantaj, ekzemple : «*Neniu povos akcepti politikajn premojn de tiuj demonoj kiuj rigardas religion kiel venenon kaj finomas lupoj la lamaojn kaj monaĥojn*», aŭ : «*Nur la ĉefo de ĉiuj tibetanoj kaj Apostolo de paco en la mondo, la Dalai-Lamao, estas rajtigita por rekoni la reenkarniĝinton de la deka Paŝĉhen-Lamao*».

Pro tio, la 11-an de julio Ĉadrel Rinpoĉe kaj lia asistanto estis (denove ?) arestataj, kaj okaze de la festo *Zamling Ĉisang*, kunveno en Taŝilumpo, kun ĉesto de ĉiuj altranguloj de la Komunista Partio kaj de la Lhasaa registaro, estis organizita por ke la monaĥoj kritikis Ĉadrel Rinpoĉeon. La monaĥoj reagis al la eklegado de 15-paĝa teksto per interbabilado spilita minacojn de « *severaj punoj* ». Ĉadrel Rinpoĉe estis akuzata pro trompo de la registaro, asociiigo kun la Dalai-Lamao, provo prokrasti la anoncon de la trovo de la reenkarigiĝinto, mem-iniciatita iro al Pekino sen antaŭa konsultado de la lokaj aŭtoritatoj ktp.

Responde de la monaĥoj kiris « *Longan vivon al Ĉadrel Rinpoĉe !* », kaj postulis lian tujan liberigon. Lia asistanto Gampa Chungla estis rekondukata al Ŝigatse kie oni petis lin denunci Ĉadrel Rinpoĉeon pro lia korespondado kun la Dalai-Lamao ; sed li respondis ke Ĉadrel Rinpoĉe neniel kulpis pri tio, ke li mem respondecis sola. La monaĥoj estis fermata por la publiko, Ŝigatse malpermesita al la turistoj. Unu el la monaĥoj, Wangdu, gardisto de la stupao konstruita memore al la 10-a Panĉhen-Lamao, laŭdire « *memmortigis sin* » la 24-an de julio sekve de tiaj « *premoj* ».

La ĉinaj aŭtoritatoj asertas ke Ĉadrel Rinpoĉe ne estas en malliberejo sed « *en hospitalo* » ; kaj ke la serĉado de la reenkarigiĝinto ankoraŭ ne finiĝis.

4/ *Lettre du Tibet*, n-ro 29 (julio 1995), p.3.

5/ Deklaro de Olivier Dupuis (Sekretario de la Radikala Partio) en Bruselo, la 23-an de junio 1995.

6/ Titolo de artikolo en *The Independant*, 19-6-1995.

La Eŭropa Parlamento (...) maltrankviligita de onidiroj laŭ kiuj 6-jara tibeta knabo, Gedün Ĉhökji Njima, estis, kun siaj gepatroj, forrabita de la ĉinaj aŭtoritatoj mallonge post sia rekono per la Dalai-Lamao kiel la lasta reenkarigiĝo de la dua plej grava spirita ĉefo de Tibeto, la Panĉhen-Lamao, forpasinta en 1989.

(...) reasertante la kontraŭleĝecon de la invado kaj okupado de Tibeto per la Ĉina Popola Respubliko kaj konsiderante ke (...) laŭ la principoj difinitaj de la internacia juro kaj la rezolucioj de UN ĝi estas okupata teritorio ;

kondamnante la provon de la ĉinaj aŭtoritatoj detruji la tibetan identecon, ĉefe per politiko de amasa translokigo en Tibeton de ĉinetaj loĝantoj, per perfortaj steriligoj kaj abortoj de la virinoj, per politikaj, religiaj kaj kulturaj persekutoj, kaj per ĉinigo de la tibeta administracio ;

urĝigas la ĉinajn aŭtoritatojn zorgi ke Gedün Ĉhökji Njima kaj lia familio estu tuj liberigataj kaj alpermesataj reiri al sia vilaĝo ;

petas la ĉinan registaron ĉesi siajn agojn de atenco kontraŭ la homrajtoj, zorgi pri la respekto de la fundamentaj rajtoj de la popoloj kaj individuoj en Tibeto (...);

(...) esprimas sian subtenon al la klopodoj de la Dalai-Lamao por restarigi per pacaj rimedoj la kulturan kaj religian liberecon de la tibeta popolo same kiel ties politikan aŭtonomecon (...) (*LT n-ro 30, sept. 95*)

Tibetanoj deziresprimas al UN bonan naskiĝdatrevenon petante ĝin ke ĝi realigu siajn tibetajn promesojn

La 20-9-95 dekkvar getibetanoj, benitaj de kvar lamaoj kiuj alvokis la protektadon de silentaj sed ĉie-ĉeestantaj bodhisatvoj kaj aliaj tibetaj diaĵoj, komencis nelimitigitan stafet-malsatstrikon por altiri la atenton de UN al daŭra okupado de Tibeto per Ĉinio. Ili petas ke UN apliku siajn tri pritibetajn rezoluciojn, voĉdonintajn en 1959, 1961 kaj 1965, petantajn Ĉinion rekoni la fundamentajn homrajtojn de la Tibetanoj, inkluzive ilian rajton de memdecido. « *Niaj petoj estas ene de la kadro de la internacia juro. Estas nenio en niaj petoj kion UN, se la volo por tio estas, ne povos efektiviĝi* », diris Namkha Tenzin, unu el la propralantoj de la movado, aldonante ke al tiu movado de senĉesa malsatstrikado aliĝos pli da getibetanoj la 21-an de oktobro, kiam komenciĝos la oficiala malfermo de la celebrado de la UN-a fonda datreveno. (omv. pere de G. Gentile)

Kunlabore kun UN : « La Granda Alpreĝo »

Londono, 6-4-1995



Kara Sinjoro, unu el la agadoj de *Monda Bonvolo* estas distribuado de preĝo, la *Granda Alpreĝo*, uzata de homoj el diversaj religiaj kredoj. Kontakto en Aŭstralio ĵus skribis al ni aldonante esperantan tradukon de la preĝo. Li raportis ke la preĝo estis laŭlegata dum interkreda diservo ĉe la 11-a *Somera Lernejo* de la Aŭstralia E-Asocio. Li sugestis ke, se estos interkreda diservo ĉe la venonta UK de *Esperanto*, pripensinde estus enigi la *Grandan Alpreĝon* en ĝian programon. (...) Mi pardonpetas skribi en la angla. Mia Esperanto estas neekzistanta (...) Kun ĉiuj bondeziroj.

Steve Nation, *World Goodwill* (fondita en 1922)

La Granda Alpreĝo

El la punkto de Lumo en la Menso de Dio lumo elflue en la mensojn de la homoj.
La Lumo malsuprenvenu sur la Teron.

El la punkto de Amo en la Koro de Dio amo elflue en la korojn de la homoj.
Kristo revenu al la Tero.

El la centro kie la Volo de Dio estas konata la celo gvidu la etajn volojn de la homoj
- la celo kiun la Majstroj konas kaj servas.

El la centro kiun ni nomas la homaro la Plano de Amo kaj Lumo realiĝu kaj sigelu la pordon post kio situas la malbono.

La Lumo kaj la Amo kaj la Povo restarigu la Planon sur la Tero.

Aktiva, kunlabora bonvolo inter popoloj estas antaŭkondiĉo por la starigo de nova mondordo de paco...

La energio de sintezo, aŭ universaleco, estas havebla por la homaro en abundeco. Per alpreĝo spiritaĵoj energioj estas vekataj kaj aktivigataj...

Granda Unueca Kredo

Cent demandoj pri Guko

III - Pri Guklando

1. Kio estas Guklando ? - *Unuiĝintaj Nacioj.*
2. Kie estas Guklando ? - *Sub viaj piedoj ; en via koro.*
3. De kie [oni] eniras Guklandon ? - *De via kredo.*
4. Ĉu Guklando situas en la spaco ? - *Jes.*
5. Ĉu Guklando estas sur la tero ? - *Jes.*
6. Kiel oni konstruas Guklandon ? - *Kontraŭ milito kaj al paco.*
7. Kio estas « etero » de Guklando ? - *Diversaj ŝtatoj.*
8. Kio estos la reĝimo de Guklando ? - *Demokratio.*
9. Laŭ kio ĝi funkcias ? - *Laŭ sennaciismo.*
10. Kiu estos civitano de Guklando ? - *Gukisto.*
11. Do, Gukisto ankaŭ estos kosmopolito ? - *Jes.*
12. Ĉu en Guklando ne troviĝas morto ? - *Ne.*
13. Kial ? - *Gukisto estas senmorta.*
14. Ĉu Guklando estos paradizo de Gukisto ? - *Oni povas tiel diri.*
15. Ĉu en Guklando ekzistas la plej granda reĝo ? - *Jes.*
16. Kial ? - *Guko estas nia ununura dio.*
17. Ĉu sen peko en Guklando ? - *Jes.*
18. Sed kosmo enhavas Gukon, ĉu ne ? - *Jes.*
19. Kial en Guklando sen peko ? - *La lando en via koro : la koro plenplenas de amo ; la lando ĉirkaŭ vi : la tero estos paca.*
20. Kio estas organizaĵo de Guklando ? - *Guka partio.*
21. Per kio venkos voĉdoninto ? - *Laŭ demokratio.*
22. Ĉu Gukisto devas venki ? - *Ĉu vi estas Gukisto ?*
23. Kio estas la plej evidenta trajto de Guklando ? - *Preĝejoj de diversaj religioj vertikale staras sur la tero.*
24. Ĉu Ĉielo estas alta kaj fora en Guklando ? - *Iru kaj spektu la sunan ĉielon.*
25. Ĉu Guklando bezonas maŝinon, elektrokomputilon, sateliton, kosmoŝipon ? - *Jes, jen estas ŝtonhakilo de praulo.*
26. Kio estas scienco en Guklando ? - *La brako de penso donata el Guko.*
27. Kio estos kutimo de Guklando ? - *Donaco el Guko.*
28. Ĉu Guklando estas feliĉa lando ? - *Jes.*
29. Ĉu paca lando Guklando estas ? - *Jes.*
30. **Ni marŝu al Guklando ! - Hura !**

IV - Pri la aŭtoro

1. Kiu estas la aŭtoro de Guko ? - *Jebumo.*
2. El kiu lando ? - *Guklando.*
3. Ĉu li estas dio ? - *Ne, li estas ido de Guko.*
4. Kial li verkas Gukon ? - *[Pro] Forto kun feliĉo el Guko.*
5. Por kio li verkas Gukon ? - *Forigi mizeron kaj militon.*
6. Kial skribas en esperanto ? - *Por disvastigi veron en la tuta mondo.*
7. Ĉu vi morgaŭ mortos ? - *Eble*.*
8. Tre bedaŭrinde, ĉu ne ? - *Ne, mi estos en Guko.*
9. Kion vi esperas ke la leganto faros ? - *Ellegu la sanktan libron ; traduku en konatan lingvon ; disvastigu la feliĉon.*
10. Finfine, kion vi volas diri al leganto ? - **Guko benas vin ! Ĉiam, ĉie, ĉiel ! Ĉial ! Amen !**

(El Guk-o)**

I. Vivo

1. En Guko, la amo estas elementa forto, ĝia direkto estas al pli granda strukturo, pli kompleksa ordo, estas al la sino de Guko !
 2. Nia etiko, rekta el Guko, ekzistas en via animo, kiel floroj, ambaŭ en la sino de Guko ! Amen.
 3. Kiel Gukisto devas obei jenajn ritojn, kiuj utilas al koro de Guko :
 - a/ Konfeso. Antaŭ via dio, vi devas konfesi jene : « Por pli bone servi je la sankta spirito, mi nun farigas Gukisto. Mi vivu en Guko. Amen ! »
 - b/ Preĝo. Tio utilas al via animo ; per tio vi ricevu benon rekte el Guko. La vortoj de la preĝo estas liberaj, kaj vi mem respondas al ĝi.
 - c/ Imposto en formo de almozo. La homoj kiuj vivas en malsato ja bezonas esti helpataj. Guko ordonas : donu al ili varmon kaj manĝaĵon, por ke vi kreskigu vin. Amen.
 4. Ne diboĉu. Antaŭ frandaĵo konsciu kiom diligent[ul]o estas kontraŭ tio. Antaŭ belulino pensu pri amo en la vivo, ne pri koito en sensstela nokto. Ili do estas granda[j], laŭ sia mezuro vivas ; ili scias ke, kiam oni kaptas ŝancon, tiam Fatalo venas !

* Lia lasta letero datiĝas je januaro : ni esperas ke nia amiko bonfartas.

** El aldonita folio.

La Serio pri Gilgameŝ

de Sînleqe'unnenni⁸

La unua traduko el la postmorta poezia antologio de Kolomano Kalocsay, *Tutmonda Sonoro*¹, estas titolita *El «Gilgameŝ»* kaj lia amiko Gastono Waringhien jam diris en 1949 ke « la *Historio de Gilgameŝ* en Babilonio [estas] la plej antikva epopeo »². Kaj fakte tiu ĉi akada³ eposo laŭ A. Yoshida⁴ « *devas esti rigardata kiel la plej malnova ekzistanta specimeno de la epopea ĝenro* »⁵; kvankam ŝajne alia epopeo, « la *rakonto pri la Diluvo en sumera versio*, [estas] *pli malnova ol la akada* »⁶: « *Eĉ povas esti ke li [Sînleqe'unnenni] aldonis el propra fonto, ie kaj tie, pli ol unu detalo, aŭ epizodo, eĉ tre disvolvita (ĉu la tuta rakonto pri Diluvo ?)* »⁷.

La centjara (ankoraŭ ne finita) restaŭrado de tiu antikva poemego malaperinta dum pli ol 2000 jaroj estas iompostioma, kiel por puzlego kies pecoj estis trovataj en almenaŭ kvar el la nunaj landoj.

Nineva versio

de la Epopeo

pri l' fama heroo Gilgameŝ,

Uruk¹¹ - a reĝ' kvina "de post la Diluvo",

fil' de la diino Ninsuna, kaj de Lugalbanda-la-Reĝo.

[el la XI-a aŭ XII-a jc. a.K.]

[el la XVIII-a jc. a.K.]

[XXVII-a jc. a.K.]

Mi prezentos al la mondo
[tiun] kiu ĉion vidis,
tu[tan teron] konis,
kaj penetris ĉiu[jn] aĵojn],
kaj esp[loris] ĉie
[la ka]ŝiton !
[Plenple]na de saĝo,
li ĉion ampl[eksis en sia rigardo] :
li kontemplis la Misterojn,
li malkovris la Sekretojn ;
al ni li konigis
pri [la tempo] antaŭ la Diluvo !
Returne de sia lontana vojaĝo,
lacega sed repacigita,
[li gra]vuris sur steelo
ĉiujn siajn agojn.
Konstruigis li la murojn
de Uruk la gregej-ĉirkaŭita
kaj Eanna, sankttrezoro,
la sakrala templo.
Vidu tiun ĉi muregon,
(densan) kiel birdokaptan reton [?] !
Rigardadu tiun bazamenton
tute senkomparan !
Palpu < tiun > sojlon
tiel fore de(venantan) !
Proksimiĝu al Eanna,
Iŝtar-restadejo,
kiun ja neniam posta reĝo
aŭ alia homo povis eĉ imiti.

Supreniru

paŝi sur la Uruk-muro ;

Provu vidi (ties) fundamentojn

kaj kontemplu la brikajon :

ĉu ne estas (ĉio)

el bakitaj brikoj ?

Ĉu la Sep Saĝuloj

ne (mem) fondis tion ?

[La 300 hektaroj urbaj, sama kvanto da ĝa]rdenoj,
same da tereno virga, estas posedadoj [de diino

Vidu tiun milon da hektaroj, . \Iŝtar.

sub rigardo cia etendiĝas] la bien' de Uruk.

[Iru preni]

la kaseton kupran,

[turnu (ties)]

bronzan ringon,

[kaj malfermu]

la pordeton de l' sekretoj,

[kaj elprenu] la tabulon lazurŝtonan

por (el ĝi) deĉifri

[kiel] tiu ĉi Gilgameŝ

tiel multajn elprovaĵojn ja travivis !

[*Escep]ta monarko,*¹²

fama kaj prestiĝa,

[pr]oda Urukido,

bubalego kornopika,

antaŭiris

li, la Kondukanto ;

[aŭ] li sekvis,

helpo de la siaj !

Forta [kapto]ret' milita,
 protektanto de la trupoj,
 furioza akvo[ma]so
 detruanta murojn (eĉ) ŝtonegajn :
 (jen) la fil' de Lugalbanda,
 Gilgameŝ la fortoŝveliĝinta,
 la infano de l' bovin' sublīma
 – la Diino Bubalin' Ninsuna – ,
 (jen ?) Gilgameŝ,
 perfekttega kaj miriga :
 li malfermis
 la pasejojn de l' montaroj,
 fosis putojn
 sur la nuko de la montoj,
 pasis trans la maron,
 la grandegan Maron,
 ĝis (de kie) elleviĝas la Sun(-Di)o,
 [kaj es]ploris tutan universon
 pro serĉado de la Vivo,
 kun aŭdaco [ali]rante
 ĝis Utanapiŝti-la-lontana,
 [restaŭ]rinto de l' sanktejoj
 kiujn fordetrus la Diluvo !
 Inter la multego de la homoj
 [eĉ ne unu kiu]
 povis rivaleti kun li
 pri suvereneco,
 [kiel] li deklari :
 "Estas mi la Reĝo, sola !"

(Tiu ĉi) Gilgameŝ
 ekde la naskiĝo
 estis prestiĝega !
 Dio dutrione,
 kaj trione homo ;
 lian korpan formon
 la sublīma Maĥ desegnis,
 [ŝi a]ranĝis la figuron
 kaj [. . .] :
 tial lia [. . .] estis [. . .]
 kaj superba [lia] p[otenc]ego !
 Estis li [. . .]
 [kun] matura [fortikeco]
 [. . .]¹³ .

[Inter la gregejoj] de Uruko
 li iradis tien kaj ĉi [ti]en ;
 kiel bubaleg', fie[re]
 li elmontris sian forton ;
 sen komparo (?)
 pri ŝvingado de armiloj ;
 liaj eskortantoj (ĉiam) staris
 je dispono (?) (lia) !
 (Sed) private la Urukaj viroj
 timotremetadis.

" Gilgameŝ ne lasas
 filon al la patro !
 [ta]ge [nok]te kun aroganteco
 [li . . .] !
 (Kvankam estas li) Paŝtisto
 de Uruk la gr[egej]-ĉirkaŭita),
 [kaj po]tenca kaj gl[oria],
 [kaj sagaca kaj prudenta (?)],
 [li] ne la[sas]
 [virgulinon al ŝia patrino],
 [eĉ] filinon de bra[vulo],
 (eĉ se) fianĉiniga ! "

Ili [aŭdigadis tiajn] plendojn
 [al la grandaj dioj],
 [ke fin]fine la ĉielaj dioj [interpelaciis]
 la Sinjoron de Uruko (dio Anu) :
 " Ĉu ne (ci) starigis
 [Gilgameŝon], arogantan bubalegon,
 sen komparo (?)
 pri ŝvingado de armiloj,
 (kun) staranta [eskortaro] ĉiam
 je dispono (?) (lia) !
 Gilgameŝon (kiu) ne plu lasas
 filon al la patro !
 (kiu) tage nokte kun aroganteco
 [. . .] !
 [Kvankam estas li] Paŝtisto
 de Uruk [la gregej]-ĉirkaŭita),
 Paŝtisto
 kaj [Reĝo de siaj regatoj],
 kaj potenca kaj gloria,
 [kaj] sagaca kaj [prudenta (?)],
 li ne lasas
 virgulinon al [ŝia patrino],
 (eĉ) filinon de bravulo,
 (eĉ se) fianĉiniga ! "

(Tiamaniere) [Anu]
 fine aŭdis la plendadon.
 Tiam ili interpelaciis Aruru-la-grandan :
 " Aruru, ci (kiu) formis [tiun homon],
 nun bonvolu formi kion (Anu) al ci diktos (?),
 laŭ l' model' de l' uragano kiel imagite de li.
 (Tiu ĉi kaj Gilgameŝo) inter si batalos,
 kaj Uruk retrovos la kvieton ! "

Elaŭdinte
 tiun ĉi postulon,
 penetriĝis Aruru de tio
 kion al ŝi diktis (?) Anu.
 Tiam post manlavo prenis ŝi argilan pecon
 kaj ĝin metis en la stepon :
 [En la ste]po
 formis ŝi Enkidu-la-bravegan.

Naskiĝinte en la Sovagejo,
bloko da Ninurta
(de l' milit' la dio nevenkebla).
Ege harkovrita
sur la tuta korpo,
havis li hararon
de virino,
kun abundaj bukloj
kiel spika kampo.
Li, sciante nek pri la samcivitanoj
nek pri landoj,
kaj vestita kiel Ŝumukan-o
(dio de l' sovaĝaj bestoj),
kune kun gazeloj
paŝtigadis.
Kune kun la herdo sia
li frekventis la akvejon ;
li regalís sin per akvo
kune kun la bestoj.

[Nu] ĉasisto,
kaptilisto,
lin ekvidis
borde de l'akvejo.
Unu fojon,
duan, trian fojon,
borde de l'akvejo
li lin trovis.
Kiam la ĉasist' lin vidis,
restis li stupora ;
kaj kun siaj predoj kiam
li reiris al ŝirmeco sia,
(la ĉasisto) [daŭre estis malkv]ieta,
kaj perpleksa kaj senvorta,
kun la koro [malserena (?)],
kaj ombrita la vizaĝo
pro la anksieco
(kiu) ĉe la ventr' [eniris en lin] :
li havis vizaĝon
de [kiu revenas] de tre for...
Malfermante sian buŝon la ĉasisto ekparolis
kaj [al sia patro] diris :
" Patro mia, (estas) viro
kiu venis de l' dezerto :
la (plej) for[ta de la lando],
la poten[ca].
[Lia muskolaro] estas fortikega :
bloko el ĉielo !
Kons[tante li va]gas
meze de l'dezerto ;
[Konst]ante [paŝti]gas
li kun sia herdo ;
[Konstante] frekventas
li la akvobordojn.
[Lin mi timis] :
de li ne alproksimiĝis !

[Li plenis miajn en]jalujojn
kiujn mi [mem] fosis ;
[li disŝiris ĉiujn] retojn
kiujn mi ete[ndis],
[kaj deturnis de mi]
bestojn kaj bestetojn !
[Li] min [ne plu la]sas
ĉasesplori en la stepo ! "
[Malferminte sian buŝon lia patro ekparolis]
kaj al la ĉasisto diris :
" [Mia fil'], en Uruk
[loĝas] Gilgameŝo.
[Viro forta]
pli ol li ne estas ;
lia muskolaro estas same [for]tikega
[kiel bloko el ĉielo] !
Ir[u al li,
filo,
lin informi (?)
pri l' potenc' de tiu homo.
Al ci donos
li [hetajron, Laĝojiga],
[kiu]n ci konduku
[kun ci ĉe ĉasado,
al ŝi priskribante]
kiom fortikega estas [tiu viro] (?).
Kiam lia herdo]
al la akv' [alvenos
ŝi demetu la ves]tajojn,
[ŝi malkaŝu] siajn [ĉar]mojn,
[kiam] li ŝin [vidos]
li [proksimiĝinte, kun] ŝi ekrilatos.
Lia herdo, [kunvivinta] kun li,
al li iĝos fremda ! "

- * *Ho-Dio-Sin-akceptu-mian-preĝon* [ne sin leku neniu!]
1/ Budapest : HEA, 1981, du vol., red. de V. Benczik.
2/ Dum sia prelego ĉe la Somera Universitato de la 34-a UK, en Bournemouth, la 8-an de aŭgusto 1949.
3/ Aŭ *asiri-babilonia*. Pri tiu lingvo vidu la Enkondukon de André Cherpillod al lia *Akada Leksikono*, 1986, p.4.
4/ Adjunkta prof. ĉe la Universitato *Seikei* en Tokio.
5/ Art. «*Epopee*» en *Encyclopaedia Univ.*, vol.VI,1971,p.373c.
6/ A. Parrot, membro de la franca *Instituto* kaj aŭtoro i.a. de *Déluge et Arche de Noé*, Neuchâtel, 1952, en sia art. Sumer de la *Encycl. Univ.*, vol. 15, 1973, p.545c.
7/ J. Bottéro (prof. ĉe la fama pariza *Ecole Pratique des Hautes Etudes*), *L'Epopee de Gilgameš : Le grand homme qui ne voulait pas mourir*, Paris, 1992, p.53, kaj p.9.
8/ Ĉu ĝi jam aperis en la « 1-a eldono de *Tutmonda Sonoro* », t.e. lia *Eterna Bukedo* (1931) ?
9/ Abed Azrié, Enkonduko al lia poezia trad. *L'Epopee de Gilgameš*, Paris, 1979, p.10. Tamen ekzemple, dudeko da fragmentoj en la babilonia – sed ne el *Gilgameš* – estis trovataj en aprilo 1995 en Barejno. (*Le Monde*, 20-4-95 p.27)
10/ *De La 300 hektaroj urbaj* (2-a kol.,lin. 9) ghis *Tiu ĉi Gilgameš ekde la naskiĝo estis pestiĝega* ! (2-a p., 1-a kol., lin. 32).
11/ Fama tiama ĉefurbo, nuntempe nomata *Waraka*.
12/ Tie kaj per tiuj vortoj komenciĝis la *Malnova Versio*.
13/ Ĉi tie mankas unu tuta verso.

Internacia Simpozio pri Ŝintoo kaj Japana Kulturo



Unu-taga simpozio pri Ŝintoo kaj Japana Kulturo okazis ĉe la *Senata Domo* de la Universitato de Londono la 21-an de novembro 1994. Ĝi estis laŭenhave kaj laŭnombre tre sukcesa. La simpozion organizis la nove fondita « *Internacia Ŝintoo Fondado* »* sub la aŭspicioj de la Japana Esplora Centro en la *School of Oriental and African Studies* (Lernejo de Orientaj kaj Afrikaj Studoj) de la Universitato de Londono. La oficialaj laborlingvoj de la simpozio estis la angla kaj la japana kun simultana interpretado ambaŭflanke.

Antaŭ 230 partoprenantoj el Britio, Japanio kaj eŭropaj landoj, prezentis ses lektoroj siajn referaĵojn en du sesioj kun paneldiskutado. La tutan Simpozion prezidis s-ro UMEDA.

La **matena sesio** portis la ĝeneralan temon « *Ŝintoo kaj Naturo* ».

D-rino Carmen BLACKER el la Universitato de Kemбриĝo parolis pri « *Ŝintoo kaj la Sanktaj Dimensioj de Naturo* », prilumante la neceson apartigi Ŝintoon kiel religion disde la politikaj ideologioj de la moderna Japana Ŝtato, kiujn oni kunligis kun la nomo « Ŝtata Ŝintoismo ».

D-ro Minoru SONODA, profesoro de la Universitato de Kioto kaj Ŝintoo pastro ĉe Sanktejo *Ĉiĉibu*, analizis la vastan etendiĝon de la sanktaj lokoj por Ŝintoo en sia majstra referaĵo « *Sanktaj Lokoj de Ŝintoo* ».

Ke la japanoj konceptas montojn kiel sanktajn kompleksojn malkaŝis D-ro Ian ASTLEY el germana Phillip's Universitato per sia « *Sanktaj Montoj en Ŝintoo Religieco* » bazita sur la memspertaj esploroj ligitaj al la montoj tra Japanio.

* Kun la Centro en Tokio, kies Ĝenerala Direktoro estas s-ro Yosimi UMEDA, prezidanto de ASISTI.

La **posttagmeza sesio** ampleksis aliajn tri referaĵojn sub la ĝenerala temo : « *Ŝintoo en kontakto kun aliaj kredoj* ». D-ro John BREEN el la Universitato de Londono en sia « *Renkonto de Ŝintoo kun Kristanismo en la Restaŭra Japanio* » argumentis ke la alproksimiĝo de Ŝintoo al Kristanismo heredita de la Meiji-registaro estis bona traktado pli akomoda ol ofte misprezentita.

D-ro Toji KAMATA, el « *Internacia Esplora-Centro pri Japanaj Kulturaj Aferoj* », atentigis intrigajn paralelojn inter Ŝintoo kaj aliaj pli fruaj kredoj en sia « *Kompara Studo pri Ŝintoo kaj Keltaj Religioj* ».

Nicola LISCUTIN, lektoro ĉe *Japana Esplora Centro* de la Universitato de Londono, provoke pritraktis misprezentitajn distingojn inter Ŝintoo ĉe unu flanko kaj popularaj religioj ĉe alia flanko. Ŝia referaĵo « *Ŝintoo kaj Popularaj Kredoj : Iliaj Kunligiĝoj ĉe Monto Iwaki en Tsugaru* » stimulis provoki la akceptitajn opiniojn.

Tiu ĉi simpozio markis vere unikan kaj senprecedencan eblecon por eŭropaj studentoj pri japanaj kulturaj aferoj pli profunde esplori ofte miskomprenatajn kaj nesufiĉe argumentitajn aspektojn pri Ŝintoo kiel la plej malnova formo de japana religio. Ĉiuj referaĵoj estis senescepte alt-nivelaj kaj prezentis kelkajn ŝlosilajn demandojn en la studado pri Ŝintoo.

Post prezentado de la referaĵoj la aŭskultantoj rajtis pridemandi diversajn punktojn el la temoj en formo de paneldiskutado, kiu vere ardiĝis pro interesaj kaj foje provokaj demandoj kaj respondoj.

Kelkaj esperantistoj en Londono ankaŭ ĉeestis tie responde al invito de s-ro UMEDA. Unu el ili tre entuziasme elpaŝis per siaj argumentoj pri la simileco inter Islamo kaj Ŝintoo.

La kolekto de la referaĵoj kaj koncernaj paneldiskutadoj estas nun kompilita por eldono.

Internacia Ŝintoo Fondado estis fondata en 1994 kun celado akceli la esploron pri Ŝintoo kiel originala fonto de la japanaj kulturaj valoroj. La intersitoj sin turnu al : Internacia Ŝintoo Fondado, Hirai 6-30-3, Edogawa-ku, Tokyo 132 Japanio. Tel. & faks. : +81-3-3610-3975. *Esperantlingvaj* leteroj estas bonvenaj.

(Raporto de s-ro Yosimi UMEDA)

**Internacia renkontiĝo de diversnacaj religianoj
okaze de la Jaro de Toleremo**

Ni, partoprenantoj de la dua "Interreligia Seminario Esperantista", en *Szombathely* (Hungario) de la 13-a ĝis 17-a de aprilo 1995, apartenantaj al 9 nacioj kaj jenaj religioj kaj spiritaĵoj movadoj : bahaismo, hinduismo, islamo, katolikismo, kvakerismo, luteranismo, movado J.E.A.N., protestantismo, taoismo, atestas pri tio, ke dum nia kvartaga kunestado ni sukcesis pli klare ekkoni la etikajn instruojn kaj praktikojn de ĉiu el ni.

Ni konkludas ke, laŭ nia sperto, se fidelaj sekvantoj de religioj kunestas kun malfermitaj koroj sen antaŭjuĝoj kaj akceptemo, ili povas ne nur toleri sed respekti unu la alian kaj en amo meditati, preĝi kaj festi kune.

Jen la «*fina deklaro*» de la 4-taga seminario pri : "Vortoj kaj bonfaroj : Kion signifas en la ĉiutaga vivo la fidela sekvo de mia (religia) etiko ?". Ĝi okazis en la agrabla loko de agrokultura lernejo. La seminarion, sub la aŭspicio de ASISTI, lerte kaj sukcese organizis Erika Tóth kaj Eva Farkas-Tatár, kiu prezidis ĝin.

Partoprenis 27 samideanoj, el kiuj tri gehungaraj pli mallonge nin vizitis aŭ helpis per simpatia ĉiĉerono. Altranga vizitanto estis P-ro Lajos Kóbor, vicprezidanto de IKUE (*Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista*), kiu gastprelegis la antaŭtagon de Pasko malgraŭ siaj multaj sacerdotaĵoj devoj.

Multaj interesaj referaĵoj estis prezentataj, el kiuj la kontribuoj de gesinjoroj :

- Bradío Moro (pollanda usonano), prezidanto de UTSLE (*Universala Tao-Stud-Ligo Esperantista*) kaj nova kasisto de ASISTI, kiu samtempe disdonis al la interesitoj la lastan numeron (3-a) de la revuo "Tao" ;

- Morteza Mirbaghian (iranano), fakulo pri islama juro, kiu malkovrigis al ni distingon inter la vera (korana) Islamo, tre tolerema, kaj ŝtataj (ofte pseŭdaj) "islamoj", bone ilustrante tiel la bedaŭrinde tre kutiman diferencon, en multaj religioj, inter instruoj kaj praktikoj ;

- Klára Mikola (hindua hungarino), kiu krom prelego pri sia kvarjara dediĉado kiel "vajŝnavi" (viŝnuano), partoprenigis nin en ĉarma festeto okaze de la naskiĝtago de la (mortinta) guruo de sia spirita majstro ;

- Martin Howard (anglo), sekretario de KES (*Kvakerista Esperantista Servo*, eksa Kvakerista Esperantista Societo), kiu ankaŭ parolis, pli persone, pri reenkariniĝoj ;

- Gabrielle Tréanton (francino) parolis pri sia sperto ene de la Movado J.E.A.N. (Juneco mensa, Edukado de si mem, Ardeco en siaj taskoj, Nobleco en la sinteno), prezentante la nove tradukitan verkon de ties (ĵus mortinta) fondinto M.A. Rohrbach : "Paco en ŝtormo" ;

- Eva Farkas-Tatár (hungarino), krome de sia serena gvidado de la diskutoj kiuj sekvis ĉiun prelegeton, alportis la vidpunkton de kore tute malfermita kalvinano ;

- Tre ŝatata ankaŭ estis la malfermiteco de P-ro Lajos Kóbor, kies prezentado de la katolika doktrino okazigis

viglan debaton, i.a. pri paradizo kaj infero kaj pura amo al Dio, sen timo nek deziro. (Kun paraleleco montrita de Ch. Lavarenne inter sanktulino Tereza el Lisieux kaj la mahajanaj budhistoj, kiuj ofertas sian paradizon aŭ nirvanon por la bono de la suferantoj.)

La programo, tre densa, bonŝance enhavis ankaŭ agrablajn vizitojn (i.a. al ruinoj de Izis-templo, vidalvide de ne plu funkcia sinagogo, kaj ekskurso al unu el la plej malnovaj abatejoj en Hungario).

ASISTI-kunveno

Ankaŭ okazis neformala ASISTI-a kunveno dum kiu Eva Farkas-Tatár raportis pri UEA-malraporto de "Publika Interreligia Devotado" en Tampere ekster la universala kongresejo (verŝajne pro neŭtraleco : por ke la Tampereanoj kaj Finnoj ne risku konfuzi esperanton kun religia afero). Tiu ĉi estas do nuligita. Kaj Christian Lavarenne raportetis pri la 6-a Monda Sesio de WCRP kaj la baldaŭa (?) aliĝo al ĝi de ASISTI.

Li atentigis pri la laŭstatuta, devo kiel eble plej rapide (re)elekti (novajn?) sekretariojn kaj prezidanton. Li alvokos pri tio ĉi en la venonta numero de *Asistilo*. (Do eventualaj kandidatoj sin anoncu kaj prezentu !)

La temo de la venonta ISE en (aŭ apud) Prago en aŭgusto 1996, t.e. tuj post la tiea UK (se la *Kristana Kongreso* okazos ĵus antaŭ ĝi kiel planite ?) estis voĉdone elektata sen kontraŭa voĉo : "Lingvo : barilo kaj ŝlosilo por interreligia dialogo" [sed vidu lastan paghon !]. Ĝi laŭeble daŭru unu tutan semajnon. La du elektitaj kunorganizantoj estas Pavla Dvorakova kaj Bernhard Westerhoff, kies neĉeeston ĉiuj bedaŭris.

Ŝi estis skribinta al kelkaj el la partoprenintoj de la unua seminario kaj preparis kongreslibreton kiu ne povis ĝustatempe atingi la ĉi-jarajn partoprenantojn sed certe utilos por la venonta seminario.

Por la sekva, 4-a ISE, en 1997, estis proponata de Bradío Moro loko : ĉe la Lingva Instituto "Unumondo", en Kedzierzyn-Kozle (PL) (kie jam estis organizita ĉi-somera "Taoisma Antaŭkongreso" de la 17-a ĝis 20-a de julio 1995).

Kaj temo, de Martin Howard, pri la evoluemo kaj (mal-)fermiteco de religioj al "novajoj" kiu concernas ilin, ek-e ĉeMaromortaj manuskriptoj aŭ novaj revelacioj por kristanismo, trovo de pli malnova manuskripto de Tao-te Ching kun malsama sinsekvo ene de ties teksto, reago de kvakerismo al reenkariniĝaj teorioj de iuj kvakeroj, ktp. , estas pliprecizigota kaj konfirmota dum la Praga ISE dank'al kunproponoj de ĉiuj pri aliaj religioj : ĉu, ekzemple, ekzistas similaj novajoj por Islamo (ĉu bahaismo aŭ Arès-revelacio estas tiaj ?), por judismo (ĉu hasidismo ?), por ŝintoismo (ĉu Oomoto ?), por hinduismo (nova avataro ?) ... Interesa sed tamen tre tikla demando laŭ multaj ĉeestantoj, kiuj iom dubis ĉu ni vere kapablos iel trakti ĝin kontentige kaj neofende por iuj religianoj ; despli malfacile ke ASISTI estas kaj volas resti neŭtrala !

(Laŭ sekretaria raporto al ASISTI-prezidanto)

La Serĉado de l' Sankta Gralo :

Renkonto kun la blanka kavaliro

[29.7] Et li blans chevaliers (...) [29.19] vient a l'escuier et li dist : " Tien, va t'en et porte cet escu au sergant « Jhesucrist, au bon chevalier que len apele Galaad (...); « et li di que li Haut Mestres li mande qu'il le port. Car « il le trovera toz dis autresint fres et autresi bon come il « est orendroit, et ce est une chose por qoi il le doit molt « amer. Et le salue de par moi, si tost come tu le verras."

Et li vaslez li demande : "Sire, coment avez vos non, que je le sache dire au chevalier quant je vendrai a lui ?" – "De mon nom, fet il, ne puez tu mie savoir; car ce n'est « mie chose que on doie dire a toi ne a home terrien; et « por ce t'en covient il sofrir a tant. Mes ce que je te co- « mant fai." – "Sire, fet li vaslez, puis que vos vostre non « ne me diroiz, je vos pri et conjur par la riens el monde « que vos plus ameç que vos me dioiz la verité de cest « escu, et coment il fu aportez en ceste terre et por qoi « tantes merveilles en sont avenues. Car onques hom a « nostre tens ne le pot pendre a son col a cui il n'en mes- « cheist." – "Tant m'en as conjuré, fet li chevaliers, que « je le te dirai. Mes ce ne sera mie a toi seul, ainç vuel « que tu i amoines le chevalier a qui tu porteras l'escu." Et cil dist que ce fera il bien. (...)

[30.32] Li vallez dist a Galaad, voyant touz cels de la place : " Sire, saluz vos mande li bons chevaliers as « armes blanches (...), et vos envoie cest escu ; et vos « mande que vos le portoz des ore mes, de par le Haut « Mestre. Car il n'est ore nus, si come il dist, fors vos « seuls, qui le doie porter. Et por ce le vos a il par moi « envoié. Et se vos volez savoir dont ces grantz aventures « sont par tantes foiz avenues, alons a lui entre moi et « vos et il le nos contera : car ainsi le m'a il promis."

[28.11] Et li l'esgardent, se dient que il est a lor avis li plus biaus et li plus riches que il eussent onques veu ; et feroit autresint soef come se totes les espices dou monde fussent espandues dessus.]

[31.16] Et Galaad respont qu'il le metra a son col puis qu'il li est envoieç (...), si pent l'escu a son col et se part de laienz et comande les freres a Dieu (...)

[31.25] Et Galaad et li vaslez se vont tant qu'il troverent le chevalier as armes blanches que li vaslez avoit autre foiz veu. Et quant il voit venir Galaad, si li vient a l'encontre et le salue, et il li rent son salu au plus cortoisement qu'il puet. Si s'entraointent et parolent li uns a l'autre, et tant que Galaad dist au chevalier : « Sire, par « cest escu que je port sont maintes aventures merveil- « leuses avenues en cest país, si com j'ai oï dire. Si vos « voudroie prier par amor et par franchise que vos m'en « deissiez la verité et coment et par coi ce est venu, car « je croi bien que vos le sachiez. » – « Certes, sire, fet li chevaliers, je le vos dirai volentiers, car je en sai bien « la verité. Or escoutez, s'il vos plaist, Galaad », fet li chevaliers.

E la blanka kavaliro (...) venas a l'eskviro e lin diras: « Tenu, iru e portu tiun ĉi ŝildon a l'serĝento de Jesu- « kristo, a l'bona kavaliro kiun o nomas Galad (...); e « lin diru ke la Hota Majstro lin petas ke li ĝin portu. « Car li ĝin trovos ĉiam tiom freŝa e tiom bona kiom ĝi « estas nuk, kaj tio estas afero pro kio li ĝin devas multe « ami. E lin salutu de mo, tiel tuje kiel ci lin vidos. » E la ŝildisto lin demandas : « Sinjoro, kiu estas via nomo, ke « mo ĝin sciu diri a l'kavaliro kvan mo alvenos a li ? »

– « Pri ma nomo, pondas li, ne potas ci scii ; kor tio « ne estas afero kiun o devu diri a ci nek a homo ĉitera ; « e pro tio, ci devas rezigni ĝin [diri] tiam. Sed tion kion « mo cin ordonas faru. » – « Sinjoro, pondas la ŝildisto, « sekve ke vo vian nomon ne nin diros, mo vin petas e « petegas pro la aĵo el l'mondo kiun vo plej amas, ke vo nin diru la veron pri tiu ĉi ŝildo, e kiel ĝi estis aportita « en tiun ĉi teron, e pro kio tiom da mirindaĵoj de ĝi « venis. Kor neniam homo de ma tempo ĝin potis pendigi « a sia kolo, a kiu tio ne farigis malbonŝancega. »

– « Tiom ci min petegis pri tio, pondas la kavaliro, ke « mo ĝin diros al ci. Sed tio ne estos al ci sola, male mo « volas ke ci konduku ĉi tien la kavaliro a kiu ci portos « la ŝildon. » E tiu ĉi diras ke tion li ja faros (...)

La ŝildisto diras a Galad, vidante ĉiujn tiujn de la loko : « Sinjoro, saluton a vo sendas la bona kavaliro « kun l'armiloj blankaj (...) e portigas a vo ĉi tiun ŝildon; « e vin sciigas ke vo ĝin portu ekde nuk je l'nomo del « Hota Majstro. Kor ne estas nuk iu, laŭ kion li diris, hor « vo sola, kiu ĝin devas porti. E pro tio li ĝin per mo « portigas a vo. E se vo volas scii de kio tiuj grandaj « aventuroj tiom da fojoj venis, allu no a li, mo e vo « kune, e li ĝin rakontos a no : kor tiel li min promesis. »

[E ili ĝin rigardas, sin diras ke ĝi estas laŭ ili la plej bella e la plej riĉa kiun ili iam vidis ; e ĝi odoras tiom dolĉe, kiom se ĉiuj aromoj del mondo estus disŝutitaj sur ĝin] (...) E Galad respondas ke li ĝin mettos a sia kolo sekve ke ĝi estas portigita a li (...); tiam li pendigas la ŝildon a sia kolo e foriras de tie e rekomendas la fratulojn a Deo. (...)

E Galad e la ŝildisto allas, tiel ke ili trovis la kavaliro kun blankaj armiloj, kiun la ŝildisto vidis la alian fojon. E kvan li vidas Galadon veni, tiam li venas a l'renkonto e lin salutas, e ĉi tiu redonas a li similan saluton kiel la lia, plej ĝentile kiel li potas. Tiam ili interkonatiĝas kaj parolas unu a l'alia, ĝis Galad diras a l'kavaliro : « Sinjoro, per tiu ĉi ŝildo kiun mo portas, multaj aven- « turoj venis en tiu ĉi lando, laŭ kion mo odis diri. Mo « do deziras vin peti pro amo e malkaŝemo, ke vo nin « diru la veron pri ĝi e kiel e pro kio tio venis, kor mo « kredas ke vo ĉi tion scias. » – « Certe sinjoro, pondas la kavaliro, mo volonte ĝin diros a vo, ĉar mo ja scias la « veron pri ĝi. Nuk aŭskultu, se tio plaĉas a vo, Galad. »

V – La blanka ŝildo kun kruco vermilja

Mirinda origino de la ŝildo

« Il avint emprés la Passion Jhesucrist quarante et deus anz que Joseph d'Arimatee, li gentix chevaliers qui despendi Nostre Seigneur de la sainte verae Croix, se parti de la cité de Jherusalem entre lui et grant partie de son parenté. Et tant errerent, quant il se furent mis a la voie par le comandement Nostre Seigneur, qu'il vindrent en la cité de Sarraz, que li rois Ewalach, qui lors estoit sarrazins, tenoit. Et a cel tens que Joseph vint a Sarraz avoit Ewalach guerre a un sien voisin, riche roi, et puissant, qui marchissoit a sa terre ; et estoit icil rois apelez Tholomers. Et quant Ewalach se fu aprestez por aler sor Tholomer, qui sa terre li demandoit, Josephes li filz Joseph dist que, se il aloit en la bataille si desconseilliez com il estoit, il seroit desconfiz et honiz par son anemi. *« Et que m'en loez vos ? »*, fet Ewalach. – *« Ce vos dirai je bien »*, fet il. Lors li comence a trere les poinz de la novele Loi et la verité de l'evangile et del crucefiement Nostre Seigneur, et del resuscitement li dist il la verité, et li fist aporter un escu ou il fist une croiz de cendal et li dist : *« Rois Ewalach, or te mostrerai apertement coment « tu porras conoistre la force et la vertu del verae Crucorie « fié. Il est voirs que Tholomers li fuitis avra seignorie « trois jors et trois nuiz. sor toi et tant fera qu'il te menra « a poor de mort. Mes quant tu ne cuideras pas que tu en « puisses eschaper, lors descoeuvre la croiz et di : Biauz « sire Diex, de cui mort je port le signe, gitez moi de cest « peril et conduisiez sain et sauf a recevoir vostre foi et « vostre creance. »*

« Okazis, kvardek e du annojn post la Pasiono de Jesukristo, ke Jozef el Arimateo, la nobla kavaliro kiu malpendigis Nian Sinjoron de la sankta vera Kruco, foriris de la urbo Jerusalem kune kun granda parto el sia paren-caro. E ili tiel vagis kvan ili ekis sur la vojo pro la ordono de Nia Sinjoro, ke ili venis en la urbon Sarrac kiun la reĝo Ewalach, kiu tiam estis saraceno, tenis. E en tiu tempo kvan Jozef venis a Sarrac, habis Ewalach militon kun iu sia najbaro, riĉa reĝo e potenco, kiu enmarŝis en lian landon; e estis tiu ĉi reĝo nomita Tholomer. E kvan Ewalach sin estis preparinta por alli kontraŭ Tholomer, kiu lian landon postulis, Jozefe la filo de Jozef diris ke se li allos a l'batalo tiel miskonsilita kiel li estas, li estos venkata e malhonorigata de sia malamiko. *« E kion vo min konsilas ? »*, pondas Ewalach. – *« Tion mo ja diras a vo »* pondas li. Tiam li komencas pritrakti la punktojn del nova Leĝo e la veron del evangelio e del krucumado de Nia Sinjoro, e pri l'resurekto li diris a li la veron, e li aporigis ŝildon kie li faris krucon el santalo e lin diris : *« Reĝo « Ewalach, nu mo cin montrós malkaŝe kiel ci potós koni « la forton e la pavon del vera Krucumito. Vere estas ke « Tholomer la fivagisto habos militsuperecon dum tri ta- « goj e tri noktoj super ci e tiom faros ke li cin kondukos « ĝis timo de morto. Sed kvan ci ne kredos ke ci potos es- « kapi el tio, tiam malkovru la krucon e diru : Bella sin- « joro Deo, de kies morto mo portas la signon, liberigu « min el tiu ĉi dangerego e min konduku sanan e savitan « a l'ricevo de via fido e via kredo. »*

La kruco okazigas miraklojn

« A tant s'en parti li rois et ala a ost sor Tholomer. Et li li avint tot ensi com Josephes li dist. Et quant il se vit en tel peril que il cuidoit veraement morir, il descovrit son escu et vit ou mileu un home crucefié qui toz estoit sanglenz. Si dist les paroles que Josephes li ot enseignees, dont il ot victorie et honor et je gitez des mains a ses anemis et vint au desus de Tholomer et de toz ses homes. Et quant il fu venuz a sa cité Sarraz, si dist a tout le pueple la verité que il ot rovee en Joseph e et manifesta tant l'estre del Crucefié que Nasciens reçut baptesme. Et en ce qu'il le crestiennoient avint que uns hons passoit par devant aux, qui avoit le poing coupé et portoit son poing en l'autre main. Et Josephes l'apela a soi et cil i vint ; et si tost com il ot touchié a la croiz qui en l'escu estoit, si se trova cil gariz dou poing qu'il avoit perdu. Et encor en avint il une aventure molt merveilleuse. Car la croiz qui en l'escu estoit s'en parti et s'aerdi au braz de celui en tel maniere que puis ne fut veue en l'escu. Lors reçut Ewalach baptesme et devint serjanz Jhesucrist, et ot puis Jhesucrist en grant amor et en grant reverence et fist garder l'escu molt chierement.

« Je tempo foriris la reĝo e allis en kampanjon kontraŭ Tholomer. E okazis a li tute tiel kiel Jozefe lin diris. E kvan li sin vidis en tia dangerego ke li vere kredis morti, li malkovris sian ŝildon e vidis meze de ĝi krucumitan viron kiu estis tute sanga. Tiam li diris la parolojn kiujn Jozefe instruis a li, tiel li habis venkon e honoron e estis liberigata el la manoj de siaj malamikoj e superis Tholomeron e ĉiujn liajn soldatojn. E kvan li revenis a sia urbo Sarrac, tiam li diris a l'tuta popolo la veron kiun li trovis ĉe Jozefe e tiom manifestis la eston del Krucumito, ke Nascien ricevis la bapton. E dum ili lin kristianigis, okazis ke homo pasis antaŭ ili, kiu habis la manon tranĉita e portis ĝin en la alia mano. E Jozefe lin vokis a si e tiu ĉi tien venis ; e tiel tuje kiel li tuŝis a l'kruco kiu sur l'ŝildo estis, tiam sin trovis tiu ĉi resanigita je l'mano kiun li perdis. E ankoraŭ avenis aventuro tre mirinda. Kor la kruco kiu sur l'ŝildo estis, foriris de ĝi e fiksigiĝis a l'brako de tiu en tia maniero ke poste ĝi ne vidiĝis sur l'ŝildo. Tiam Ewalach ricevis la bapton e fariĝis serĝento de Jesukristo e habis poste Jesukriston en granda amo e en granda respekto e gardigis la ŝildon tre kare.

« Après avint, quant Josephes se fu partiz de Sarras entre lui et son pere et il furent venu en la Grant Breitaingne, qu'il troverent un roi fellon et cruel qui ambedeus les emprisonna et avec els grant partie de crestiens. Quant Josephes fu emprisonnez, tost en ala loing la novele, car alors n'avoit home ou monde de greignor renomnee, et tant que li rois Mordrains en oi parler. Si semonst ses homes et ses genz entre lui et Nascien son serorge et s'en vindrent en la Grant Breitaingne sor celui qui Josphe tenoit en prison ; et le deseriterent tout et confondirent toz cels dou país, si que en la terre fu espandue sainte crestientez. Et il amoient tant Josephes que il ne partirent puis dou país, ainz remestrent avec lui et le sivoient par toz les leus ou il aloit. Et quant Josephes vint au lit mortel et Ewalach conut qu'il le covenoit a partir de cest siecle, il vint devant lui et plora mout tendrement et dist : « Sire, puis que vos me lessiez, « or remaindrai je toz seus en cest país, qui por amor de vos « avoie ma terre lessiee et la douçor de ma nacion. Por Dieu, « puis qu'il vos covient departir de cest siecle, lessiez moi de « vos aucunes enseignes qui me soient après vostre mort re- « membrance. » – « Sire, dist Josphes, ce vos dirai je bien. »

« Poste okazis, kvan Jozefe foriris de Sarrac kune kun sia patro e avenis en la Grandan Britonion, ke ili trovis reĝon perfidan e kruelan kiu malliberigis ilin ambaŭ e kun ili grandan aron da kristanoj. Kvan Jozefe estis malliberigita, rapide pri tio allis foren la novaĵo kor tiam ne estis homo en la mondo kun pli granda famo, e tiom ke la reĝo Mordrain odis paroli pri ĝi. Tiam kunvokis siajn vasalojn e siajn trupojn li e Nascien lia bofrato kune, e venis en la Grandan Britonion kontraŭ tiu kiu Jozefe-on tenis en prizono ; e ili lin tute elpelis e renversis ĉiujn tiujn del lando, tiel ke en la tuta regiono disvastiĝis sankta kristanaro. E ili tiom amis Jozefeon ke ili ne foriris plu del lando, sed restis kun li e lin sekvis en ĉiujn lokojn kien li allis. E kvan Jozefeo venis a l'morta lito e Ewalach eksciis ke li devos foriri el ĉi tiu mondo, li venis antaŭ lin e ploris tre tenere e diris : « Sinjoro, tial ke vo min forlasas, nuk mo restos « tute sola en ĉi tiu lando, [mo] kiu por amo a vo man teron « forlasis e la dolĉon de ma nacio. Pro Deo, tial ke vo devas « foriri el ĉi tiu mondo, lasu a mo iujn signojn de vo, kiuj estu « por mo post via morto memorigajo. » – « Sinjoro, diris Jozefeo, tion mo ja diros a vo. »

La vermilja kruco

« Si comenca a penser que il li porroit lessier. Et quant il ot grant piece pensé, si dist : « Rois Ewalach, fai moi apporter ici « icel escu que je te baillai quant tu alas en la bataille sor « Tholomer. » Et li rois dist que si feroit il volentiers, car il estoit pres d'ilec come cil que il fesoit porter o soi en quelque leu que il alast. Si fist devant Josephes apporter l'escu. A cel point que li escuz fu aporetz devant Josephes avint que Josephes saignoit mout durement par mi le nes, si ne pooit estre estanchiez. Et il prist tantost l'escu et i fist de son sanc meisme cele croiz que vos veez ci : et bien sachiez que ce est icel escu meismes que je vos cont. Et quant il ot fete la croiz tele come vos la poez veoir, il li dist : « Veez ci l'escu que je « vos les en remembrance de moi. Et ja cest escu ne verroiz « qu'il ne vos doie souvenir de moi, car vos savez bien que « ceste croiz est fete de mon sanc, si sera toz jorz mes ausi « fresche et ausi vermeille come vos la poez veoir orendroit, « tant come li escuz dura. Ne il ne faudra mie tost por ce que « ja mes nel pendra nus a son col, por qu'il soit chevaliers, « qu'il ne s'en repente, jusqu'a tant que Galaad, li Bons Che- « valiers, li darreins dou lignage Nascien, le pendra a son col. « Et por ce ne soit nus tant hardiz qui a son col le pendre se cil « non a qui Diex l'a destiné. Si i a tele achaison que, tout ausi « come en l'escu ont esté veues merveilles graindres que en « autre, tout ausi verra len plus merueilleuse proece et plus « haute vie en lui que en autre chevalier. » – « Puis qu'il est « einzi, fet li rois, que vos si bone remembrance de vos me lai- « rez, or me dites s'il vos plect ou je lairé cest escu. Car je vol- « droie molt qu'il fist mis en tel leu ou li Bons Chevaliers le « trovast. » – « Donc vos dirai je, dist Josphes, que vos fe- « roiz. La ou vos verroiz que Nasciens se fera metre emprès sa « mort si metez l'escu : car ilec vendra li Bons Chevaliers ... »

« Si est tout ainsi avenu come il le dist, car (...) vos ven- nistes en cele abeie ou Naciens gist. Si vos ai ore conté por quoi les granz aventures sont avenues as chevaliers pleins de fol hardement qui sor cestui deffens en voloient porter l'escu qui a nului n'estoit otroiez fors a vos. »

« Tiam li komencis pripensi kion li potos lasi a li. E kvan li estis grandan pecon [da tempo] pensinta, tiam li diris : « Reĝo « Ewalach, aportigu a mo ĉi tien tiun ŝildon kiun mo cin donis « kvan ci allis a l'batalo kontraŭ Tholomer. » E la reĝo diris ke tiel li volonte faros, kor ĝi estis apud tie, kiel tio kion li portigis kun si kien ajn li allis. Tiam li antaŭ Jozefeon apartigis la ŝildon. Je tiu momento kvan la ŝildo estis aportata antaŭ Jozefeon, okazis ke Jozefeo tre abunde sangis ĉe l'nazo, tial ĝi ne potis esti ŝtopata. E li tuj prenis la ŝildon e faris sur ĝi per sia sango mem tiun krucon kiun vo vidas ĉi tie : e eksciuj ja, ke tio estas tiu ŝildo mem kiun mo narras a vo. E kvan li estis farinta la krucon tia kia vo ĝin potas vidi, li diris a li : « Vidu ĉi tie la « ŝildon kiun mo lasas a vo kiel memorigajon de mo. E jam ĉi « tiun ŝildon vo ne plus vidos sen ke li ne memorigu pri mo, « kor vo ja scias ke ĉi tiu kruco estas farita per ma sango, e ĝi « estos ĉiam same freŝa e same vermilja kia vo ĝin potas vidi « nuk, tiom (longe) kiom la ŝildo daŭros. E post eĉ ne unu mo- « mento neniam plu ĝin pendigos iu a sia kolo, por esti kavali- « ro, ke li ne pentos; ĝis tempo kvan Galaad, la Bona Kavaliro, « la lasta del familia linio de Nascien, ĝin pendigos a sia kolo. « E pro tio ne estu iu tiom aŭdaca kiu a sia kolo ĝin pendigos, « se ne tiu a tiu Deo ĝin destinis. E pri tio estas tia kialo ke, « tute same kiel ĉe la ŝildo estis vidataj mirindajoj pli grandaj « ol ĉe aliaj, tute same oni vidos pli mirindan prodecon e pli « hotan vivon en li ol en alia kavaliro. » – « Tial ke estas tiel, pondas la reĝo, ke vo lasos a mo tiom bonan memorigajon de « vo, nuk diru a mo, se tio plaĉas a vo, kie mo lasos ĉi tiun ŝil- « don. Kor mo multe volas ke ĝi estu metita en tian lokon kie la Bona Kavaliro ĝin trovu. » – « Mo do diros a vo, diras Jozefeo, kion vo faros. Kien vo vidos ke Nascien metigos sin post « sia morto, tien mettu la ŝildon : kor tien venos la Bona « Kavaliro (...) » E ĉio okazis tiel kiel li diris, kor vo venis en tiun abatejon kie Nascien kuŝas. E mo nun narris a vo, pro kio la grandaj aventuroj avenis a l'kavaliroj plenaj de freneza aŭdaco, kiuj malgraŭ ĉi tiu malpermeso volis porti la ŝildon kiu por menu estis donacita hor por vo. »

E kvan li estis tion narrinta, tiam li malaperis laŭ tia maniero ke neniam Galaad sciis kia li estis fariginta nek kiu-direkten li estis turnigata.

Leksikono de la praesperantaj vortoj :

famillo : familiao	habi : havi	hor' : krom	a : al	alli : iri	anno : jaro	bella : bela	Deo : Dio	e : kaj
nari : rakonti	no : ni	nuk : nun	hota : alta	kor : ĉar	kvan : kiam	ma : mia	metti : meti	mo : mi
			o : oni	odi : aŭdi	pondi : respondi	poti : povi	vo : vi	

Komuna beno de la Ekumena Patriarko kaj de la Papo de Romo



Bartolomeo la I-a kaj Johan-Paŭlo la II-a en Sankta-Petro

Unuafoje de post sia elekto kiel Patriarko de Konstantinopolo en 1991, Bartolomeo la I-a vizitis la Papon de Romo en Vatikano en junio 1995. *Unua inter egaluloj* de la ortodoksiaj episkopoj el la tuta mondo, li jam vizitis ĉiujn ortodoksiajn patriarkojn.

En la festo de la sanktuloj Petro kaj Paŭlo, ili kuncelebris sanktan liturgion (meso) en la baziliko *Sankta-Petro*, miksan te latinajn kaj grekajn ritojn, kun evangelio proklamita en ambaŭ lingvoj, kaj la « *Simbolo de la Apostoloj* » de Nice-Konstantinopolo (kies traduko la *Credo* estas, krom la aldonita *Filioque* !) en la greka : la Papo kvalifikis tiun ĉi version « *norma kaj nerevokbla esprimo de la ununura fido de la Eklezio* » al kiu « *neniu fidoknfeso taŭga por aparta liturgio povas malfideli* ».

Fine ambaŭ spiritaj ĉefoj kune benis la fidelulojn per komuna beno el la centra loĝio en *Sankta-Petro*.

Komuna deklaro

Fine de sia renkontiĝo « *la Papo de Romo kaj la Ekumena Patriarko* » publikigis komunan deklaron, el kiu jenaj eltirajoj :

« (...) *Konsiderante ke en ĉiu loka Eklezio realiĝas la mistero de la dia amo, kaj ke ĉi-maniere la Eklezio de la Kristo manifestas sian aktivan ĉeston en ĉiu el ili, la internacia ambaŭa Komisiono povis deklari ke niaj Eklezioj rekonas sin kiel frat(in)aj Eklezioj, kune respondecaj pri la konservo de la ununura Eklezio de Dio (...)* »

Al renkontiĝo inter la Papo de Romo kaj la Patriarko de Moskvo

Prepariĝas historia renkontiĝo venontjare en Hungario inter la Papo de Romo Johan-Paŭlo la II-a, kaj la Patriarko Aleksij la II-a, spirita ĉefo de la rusa ortodoksia Eklezio. Laŭ hungaraj katolikaj fontoj, tiu ĉi granda evento – la Papo laŭte revas pri reunuiĝo de la katolikoj kaj ortodoksuloj antaŭ la jaro 2000 – verŝajne okazos en majo aŭ junio 1996 en la fama benediktana Abatejo de Pannonhalma, kiu festos venontjare sian miljarigon. La episkopo Asztrik Varszegi, Abato de Pannonhalma, estas la iniciatinto de tiu tre grava renkontiĝo.

Laŭ ENI/APIC (*La Libre Belgique* 18-4-1995, p.7)

En la perspektivo [de la Jubileo de la 2000-a jaro] ni instigas niajn fidelulojn, katolikajn kaj ortodoksiajn, firmigi la spiriton de frateco kiu devenas de la ununura bapto kaj de la partopreno en la sakramenta vivo (...) Tia spirito devas kuraĝigi katolikojn kaj ortodoksulojn, ĉefe kie ili vivas unu kun la aliaj, al pli intensa kunlaboro en la kultura, spirita, paŝta, eduka kaj socia sfero, evitante ĉium tenton de superrajta zelotismo por sia propra komunumo domaĝe por la alia. Ĉiam superu la bono de la Eklezio de la Kristo (...)

(*La Croix*, 1-7-95, p.7)

La Patriarko de Cilicio elektita Katolikos de ĉiuj armenoj

Kunvenintaj en Eĉmiedzjn (Armenio), sidejo de la Armena Apostola Eklezio, la 415 laikaj kaj 45 klerikaj delegitoj de la nacia konfesia Asembleo elektis komence de aprilo 1995 Garegin, Patriarkon de Cilicio, la 131-a *Katolikos* de ĉiuj armenoj.

Armenio estis la unua nacio kiu donis al kristanismo, en 301, la statuson de oficiala religio, post ĝia konverto per sankta Gregorio la Iluminanto ĉ. 295. La Armenia Eklezio apartiĝis disde la Granda Eklezio pro ĝia rifuzo de la Konkilio de Kalcedono en 451. Sed ĝi subskribis la efemeran unuiĝon de Florenco en 1439.

Ĝi eniris en la *Ekumenan Konsilion de la Eklezioj* en 1962, kaj sendis observantojn al la II-a Vatikana Konkilio. Jam Pia la XII-a [en sia encikliko *Sempiternus Rex*] kvalifikis ĝian monofizismon* « *nur vorta* » [do fakte ne vere *hereza* ...laŭ katolika vidpunkto !]. Ankaŭ « *larĝa konsento manifestiĝis dum ne oficiala konsultiĝo inter ortodoksiaj kaj nekalcendonaj teologoj* »**.

Boris Tumanov (el *La Libre Belgique*, 11-4-95, p.17)

* Mi ne komprenas kial en PIV estas skribite *monofizito* kvankam la (fakte jam kunmetaja) radiko ne estas *monofizit-* sed *monofiz-* (*mono* + la *fiz-* de *fiz-iko* !), kiu, kun la esperanta sufikso *-ist-* devas laŭregule fariĝi *monofizisto*.

** En Aarhus (DK) en 1964 : H. Legrand, « *La armena Eklezio* », en *Encyclopaedia Univer.* vol.II, 1968, p.438b.

Ĉu la kopta Papo Ŝenuda la II-a renkontiĝos kun la Papo de Romo ?

La kopta Papo Abba Ŝenuda la II-a ankoraŭ ne respondis al invito de la vatikana Papo Johan-Paŭlo la II-a pri la jubileo de la jaro 2000, klarigante : « *Mi deziras havi la tempon studi la celojn de tiu renkontiĝo* ».

Cetero, antaŭ jurnalistoj komence de junio 1995, li opiniis : « *La armitaj islamistoj lasis profundajn vundojn en la socio, oni devas krei novan spiriton por realproksimigi kristanojn kaj islamanojn* ». Laŭ li la koptoj havas tre bonajn rilatojn kun la moderaj islamanoj. Li aldonis ke « *la popolo ekkomprenas ke ĝi estis trompita kaj ke la islamistoj havas nenion religian* ».

Al-Ahram Hebdo, 20-6-1995, p.4

Portretoj de forpasintaj grandaj teologoj : Yves Congar per Hans Küng

Mi unuafoje renkontis Ivon Congar en Romo, komence de la 50-aj jaroj (...) en la epoko de la debato pri la pastroj laboristoj en Francio. Ivo Congar estis viktimo de la Inkvizicio*, ĉefe pro sia libro « *Vera kaj falsa reformo en la Eklezio* » (1950). Oni ekzilis lin el Parizo kaj post restadejo en Oksfordo kaj Jerusalemo, estis la vico de Romo gastigi lin. Lia alveno tute ne estis anoncita ĉar ĉiu publika prelego estis malpermesita al li. Deko el ni tamen havis la okazon lin vidi kaj aŭdi ĉe la centro *Unitas*. Tiu renkontiĝo profunde impresis min.

(...) Neniu pli influis mian propran ekleziologion – se mi esceptas miajn spertojn en Romo kaj la teologion de Karl Barth – ol la paĝoj pri la Eklezio verkitaj de Ivo Congar. Li sciis kunigi la francan klarecon kaj la forton de la tomisma metodo kun rimarkinda kono de la germana historia esplorado ; en la fakoj de ekleziologio, ekumenismo kaj laikaro, la rezultatoj kiujn li atingis forigis la katenojn de malvasta tradicio.

Ni revidis unu la alian jam antaŭ kaj ĉefe dum la II-a Vatikana Koncilio : ni ambaŭ estis tie kiel ekspertoj. Ni travivis tie momenton da gloro por la teologio kaj la teologoj. La lingvo de la Koncilio estis la latina kaj la episkopoj estis do devigataj sintumi al la teologio se ili volis tutsimple povi ekparoli. Ni do verkis intervenojn por episkopoj, kaj ni publikigis kelkajn el ili en kolektiva libro kiu estis tradukata en diversajn lingvojn.



J. Gaumy-Gamma

Yves Congar (J. Gaumy-Gamma, el *Act. Rel.*)

Ni tre ofte vidis unu la alian, ĉar ni estis spirite unuigitaj. Mi neniam forgesis kion li diris al mi en flanko navo de [la baziliko] Sankta-Petro dum koncilia sesio:

« *Vi probable rimarkis tion ĉi : la episkopoj ne multe deziras aŭdi nin disvolvi argumentojn, ili nur volas scii ĉu ni estas por aŭ kontraŭ [propono]. Ili decidigas laŭ sia konfido al la teologoj.* »

Trad. de J.L. Schlegel. *L'Actualité Religieuse*, aŭgusto 95.

* La aŭtoro tiel celas la Kongregacion pri la Sankta Ofico, renomitan en 1812 *Kongregacio por la Doktrino de la Fido*.

M.D. Chenu, la dominikano kiu sukcesis remeti historion en teologion

1. La antaŭa teologio

Kiam P-ro Mari-Dominiko Chenu estis instalata Superulo de la Studdomo de Teologio *La Salikejo*¹, la katolika teologio, direktata de la Vatikana Aŭtoritato, estis abstrakta. Ĝi estis rigardata kiel senmova kono laŭlonge de la tempo. De pluraj jarcentoj la teologio, tia kia ĝenerale instruita, estis kvazaŭ fermata en si mem. Ĝiaj argumentoj estis strikte internaj : la diaj Skriboj, la arbitraj decidoj de la Roma Majstra Aŭtoritato. Ĉiuj eksteraj premisoj, venintaj ekzemple el la historio, havis nenian rajton esti konsiderataj : ili estus juĝataj kiel dogmaj eraroj kaj oficiale kondamnotaj. La « *Indekso*² » estis tutpreta por ilin enlistigi.

2. Instruado de la Historia Teologio

La « *Salikeja* » realista Teologio ne estis kreata de unu homo, nek en unu tago. Kiam la juna Chenu alvenis al *La Salikejo*, multaj dominikanoj jam de longe laboris en tia orientiĝo : P-ro Mandonnet per siaj historiaj instruoj en la Universitato de Friburgo (CH), P-ro Lagrange en la *Biblia Lernejo de Jerusalemo*³, P-roj Lemonnier, Roland-Gosselin, Gardeil, Congar ktp.

Okaze de la naskiĝtaga⁴ celebrado de sankta Tomaso el Akvino, en 1937 kiel Rektoro de *La Salikejo*, P-ro M.D. Chenu prezentis resumon de la instruita doktrino, kiun li poste precizigis en libreto ne oficiale prezentita : *Skolo de teologio : La Salikejo*. Jen, laŭ la Salikejaj teologoj, la du ĉefaj kvalitoj de aŭtentika katolika teologio : ĝi devas fariĝi historia sen ĉesi esti fida.

a/ Scienca karaktero de la mezepoka teologio

Kiam P-ro Chenu posedis la necesan teknikon por siaj mezepokaj studoj ? Neniu precize scias. Sed en *La Salikejo*⁵ li renkontis kelkajn el la plej evoluintaj teologoj de tiu tempo : L. Lemonnier, Roland-Gosselin, Mandonet kiu ankaŭ estis sciencie unuigintaj kun la kreinto de la *Jerusalema Biblio* : P-ro Lagrange.

En tiu altnivela medio, lia instrufako estis la enkonduko al la studo de Sankta Tomaso. Lia influo etendiĝis ĝis Kanado, ĉe la Universitatoj de Ottawa kaj Montreal. La internacia Revuo de la *Instituto de Mezepokaj Studoj* publikigis liajn kreivajn artikolojn.

Ne estas strange ke en tia medio P-ro Chenu rapide interesiĝis je la scienca karaktero de la teologio. Li publikigis jenajn verkojn : « *La teologio kiel scienco en la XIII-a jc.* », kaj en larĝpublika kolekto : « *Mi scias – mi kredas* » kaj « *Ĉu teologio estas scienco ?* ».

Lia mezepokismo venas el la fakto ke la scienca teologio naskiĝis en la Mezepoko. Li estis konvinkita ke iu ajn doktrino povas esti profunde komprenata nur se oni ĝin situigas en la medio en kiu ĝi naskiĝis, nur, finfine, se per komparo kun la antaŭaj aŭ samtempaj klopodoj, oni distingas ĝian originalecon kaj riĉecon.

Tra ĉiu el la diversaj lokoj kaj fazoj de ĝia ekzisto *La Salikejo* estis la centro de Realista kaj Renovata Teologio. Tiu ĉi ne plu estis nur abstrakta, ekskluzive sekanta la dian Revelacion, sed samtempe konsideranta la seninterrompajn evoluojn de la tuthomara vivo.

La Teologio estas la Scienco pri Dio, sed ne nur pri Dio en Si mem. La Teologio estas la Scienco ankaŭ pri Dio Kreanto de la mondo. Ĝi estas la Scienco de Dio vivanta en alia sfero ol la nia, sed veninta per la *Vorto*⁶ en nian propran kreitan mondon, partoprenanta por ĉiam la homan vivon sur la tero kaj poste en la ĉieloj. La tera historio de la enkarniĝinta *Vorto* estas la tuta historio, dia kaj homa, kaj konstituas, laŭ la konvinko de la kristanaj kredantoj, la tuton de la sola *totala* scienco. Kaj la teologio fariĝas la frat(in)o de ĉiuj sciencoj de la homo : kosmologio, astronomio, geografio, zoologio, botaniko ktp.

Inter nenombreblaj ekzemploj en la teologia penso de P-ro Chenu ni eltiras nur du aparte elvokajn signojn :

1/ P-ro Chenu, jam en Belgio, helpis per siaj spiritaj konsiloj la komencantajn ge-*JOCistojn*⁷, kaj poste la *Sacerdotajn-laboristojn*⁸.

2/ En sia profeta Antaŭparolo al la franca libro *Internacia Lingvo por la Mondo kaj por la Eklezio*⁹, li skribis : « La Paco povas esti nur tutmonda, sub minaco resti senvalora... Estas urĝe transpasi la partikularismojn. La instrumentoj de tia operacio estas diversaj. Inter ili, jen unu : **Esperanto**, ĉi tie prezentita kaj analizita. Ĉiu homo estas invitata observi kaj mezuri ĝian oporunecon kaj ĝiajn vivrimedojn. Ĉiu Kristano, en tiu « vasta mondo kiu estas lia paroĥo », kiel diris P-ro Congar, estas invitata konsideri, kun evangelia atento, tiun ĉi **ekumenismon de la lingvo.** »

b/ Profunda fido de P-ro Chenu

Se P-ro Chenu estis tiel scienca teologo, tio devenis de lia profunda fido. Li tute rifuzis la ideon ke teologio povus konstruiĝi ekster la fido. Li eĉ skribis en *Teologio kiel scienco* : « Se, konsekvence, teologio nun ekipas sin en scienca branĉo kaj prenas je ĝia servo la aristotelan racion (...) la scienca kvalito de tiu ĉi teologio mezuriĝas ne unue laŭ la rigoro de la raciaj instrumentoj uzitaj, sed unue laŭ la potenco de la fido. »

Kaj P-ro Chenu insistas : « Multaj teologoj finfine alvenis la tiu ĉi konkludo, ke la teologio ne postulas la supernaturan fidon... Ekde nun, la nur formala konsento kun la dogma formulo sufiĉus, kaj la nekredanto povus konstrui sur ĝi bonan argumenton se ties silogismo sekvas la leĝon de la tri termoj. Teologio ne plu estus pia, sed ĝi estus vera. Ni mem diras ke ĝi estus morta kaj laŭlitere senanima racia ludo... »

3. Post la eldonado de « Skolo de Teologio »

La libreto « *Skolo de Teologio* » ne plaĉis al ĉiuj. Aparte la aserto ke teologo devas inspiriĝi de la historia metodo kaj historiaj situacioj laŭ la jarcentoj komencante ekde la mezepoka realista argumentaro, malplaĉis al iuj Romaj aŭtoritatoj. Iom post iom la klano de la konservativaj teologoj fariĝis forte kontraŭa al la historia metodo kaj finfine, post kvin jaroj, la libreto estis metata en la Indekson, kaj samtempe ĝia aŭtoro estis oficiale kondamnata al teologia silento.

Tiu kondamno estis drama, kaj por Chenu kaj por ĉiuj historiecaj teologoj, kiuj laboris en la sama spirito. Feliĉe, Kardinalo Suhard venigis Chenu kaj laŭvorte diris al li : « *Patreto, ne malsereniĝu ! Post 20 jaroj ĉiuj parolos kiel vi !* »

Tiuj amikaj paroloj fariĝis vera profetaĵo : precize 20 jarojn poste, la inspirita Papo Johano la XXIII-a, kun la II-a Vatikana Koncilio, tutmonde proklamis aŭtentika la historian teologion, kiun de malproksime, en la Mezepoko, inspiris Sankta Tomaso la Akvinano, kaj reenkondukis en la XX-an jarcenton multaj dominikanoj inter kiuj ĉefe la tiel klarvida kaj kuraĝa Patro Marie-Dominique Chenu.

Frato Louis Bourdon op

Bibliografio :

M.D. Chenu, *Une école de théologie : le Saulchoir*, kun la studoj de Giuseppe Alberigo, Etienne Fouilloux, Jean Ladrière kaj Jean-Pierre Jossua. Paris, Le Cerf.

Louis Bourdon, *Une langue internationale pour le Monde et pour l'Eglise*, kun Antaŭparolo de P-ro Chenu. (25 FF sentakse ĉe P-ro L. Bourdon, Dominika Konvento, 7 avenue Salomon, F-59800 Lille).

Notoj

1/ *La Salikejo* estas laŭvorta traduko de *Le Saulchoir*, nomo de bieno situata en Kain-la-Tombe, vilaĝo proksima al Tournai, en la sudo de Belgio. Tie estis organizita post la elpelo el Francio pro la kontraŭ-religiaj leĝoj de 1903 [aŭ ĉu ne pli ekzakte 1905 ?] la oficiala studdomo de la dominikana *Provinco de Francio*. Ĝi enhavis du Fakultatojn : pri Filozofio kaj pri Teologio, kun 22 instruistoj kaj 125 studentoj en 1937. Ĝi revenis Francien, apud Parizo.

2/ *Index librorum prohibitorum* : listo de la libroj prohiĉbitaj [al la katolikaj fideluloj]. Ĝia lasta eldono datiĝas je 1948, kaj ĝi estis oficiale nuligata en 1966, tuj post la II-a Vatikana Koncilioj.

3/ Vidu jam *Asistilo* n-ro 16 p.26 .

4/ Verŝajne pli ekzakte de lia « naskiĝo en la ĉielo », t.e. lia morto, la 7-an de marto 1274, ĉar lia naskiĝtago restas nekonata ; eĉ ne ekzistas tuta certeco pri la jaro : 1225 (aŭ 1224). Depost la reformado de la liturgia kalendaro li estas festata la 28-an de januaro, daton de la translokigo de liaj relikvoj en Tuluzon en 1369. (Li estis kanonizita en 1323 kaj deklarota Doktoro de la Eklezio en 1567).

5/ La scienca atmosfero de tiu skolo riziĝis ekde la nomo de ties periodaĵo : « *Revue de Philosophie kaj Teologiaj Sciencoj* ».

6/ La aŭtoro fakte uzis la vorton *la Verbo* [de la franca *le Verbe*, t.e. la Parolo], sed ŝajnas ke en esperanto tiu ĉi vorto havas nur gramatikan sencon, almenaŭ laŭ PIV. Ni do sekvis la kutimon de la klasika esperanto-versio de la *Nova Testamento* traduki la grekan (ĉefe johanan) esprimon *ho logos* per la *Vorto*. (Kvankam Gerrit Berveling preferis *la parolo*-n.)

7/ Komencaj literoj de *Jeunesse Ouvrière Chrétienne* [Kristana Laborista Junularo], apenaŭ tolerata de la oficiala franca Eklezio kaj rigardata de la *bonaj fideluloj* kiel duonkomunista.

8/ Ĉirkaŭ centhoma movado, naskiĝinta en Francio tuj post la dua mondmilito, sub la influo de kardinalo Suhard, pariza ĉefepiskopo. Ofte engaĝiĝintaj en politiko kaj sindikatoj, ili estis malpermesataj de Pia la XII-a en 1954, sed la permeso estis redonata en 1965.

Jogosutro de Patanjali :

भवप्रत्ययो विदेहप्रकृतिलयानाम् ।

श्रद्धावीर्यस्मृतिसमाधिप्रज्ञापूर्वक इतरेषाम् ।

तीव्रसंवेगानामासन्नः ।

मृदुमध्याधिमात्रत्वात्ततोऽपि विशेषः ।

ईश्वरप्रणिधानाद्वा ।

क्लेशकर्मविपाकाशयैरपरामृष्टः पुरुषविशेष ईश्वरः ।

bhava-pratjajo videha-prakr(i)ti-lajānām / (19)

śraddhā-virja-smr(i)ti-samādhi-praḡñā-pūrvaka itareṣām / (20)

tīvra-samvegānām āsannah / (21)

mr(i)du-madhjādhi-mātravāt tato 'pi viśeṣah / (22)

iśvara-pranidhānād vā / (23)

kleśa-karma-vipākāśajājir aparāmr(i)śtah puruṣa-viśeṣa iśvarah / (24)

श्रद्धावीर्यस्मृतिसमाधिप्रज्ञापूर्वक इतरेषाम् ।
उपायप्रत्ययो योगिनां भवति । श्रद्धा चेतसः संप्रसादः ।
सा हि जननीव कल्याणी-योगिनं पाति तस्य हि
श्रद्धानस्य विवेकायिनो वीर्यमुपजायते । समुपजात-
वीर्यस्य स्मृतिरुपतिष्ठते । स्मृत्युपस्थाने च चित्तमना-
कुलं समाधीयते । समाहितचित्तस्य प्रज्ञाविवेक
उपावर्तते ।

येन यथार्थं वस्तु जानाति । तदभ्यासात्तत्तद्विष-
याच्च वै राग्यादसंप्रज्ञातः समाधिर्भवति ॥ २० ॥

किमेतस्माद्वेवासन्नतरः समाधिर्भवति ? अथास्य
लाभे भवत्यन्योऽपि कश्चिदुपायो न वेति ईश्वर-
प्रणिधानाद्वा । प्रणिधानाद्भक्तिविशेषादावर्जित
ईश्वरस्तन्मनुष्यं ह्लास्यभिध्यानमात्रेण । तदभिध्यान-
मात्रादपि योगिनः प्राप्ततरः समाधिः । समाधि-
फलं च भवतीति ॥ २३ ॥

अथ प्रधानपुरुषव्यतिरिक्तः कोऽयमीश्वरो
नामेति ? क्लेशकर्मविपाकाशयैरपरामृष्टः पुरुषविशेष
ईश्वरः । अविद्यादयः क्लेशाः । कुशलाः कुशलानि
कर्माणि । तत्फलं विपाकः तदनुगुणा वासना प्राश-
यात्ते च मनसि वर्तमानाः पुरुषे व्यपदिश्यन्ते ।

तच्च तस्यैश्वर्यं साम्यातिशयविनिर्मुक्तम् । न
तावदंश्वर्यान्तरेण तदतिशय्यते । यदेवातिशयि
स्यात्तदेव तस्यात् । तस्माच्च काष्ठाप्राप्तिरेश्वर्यस्य
स ईश्वर इति । न च तत्समानमेश्वर्यमस्ति ।

śraddhā-virja-smr(i)ti-samādhi-praḡñā-pūrvaka itareṣām /
upāya-pratjajo joginām bhavati / śraddhā cetasah sampra-
sādah / sā hi jananīva kalyāṇī joginam pāti tasya hi śrad-
dha-dhānasya vivekārhīno virjam upajājate / samupaḡāt
virjasya smr(i)tir upatiṣṭhate / smr(i)tj-upasthāne ča čit-
tam-anākulam samādijate / samāhita-čittasja praḡñā-
viveka upāvartate / jena jathārtham vastu ḡnāti / tad-
abhjāsāt tat-tad-viśajāč ča vājrajād asampagnātah samā-
dhir bhavati // 20 //

kim etasmād evāsannatarah samādhir bhavati ? athāsja
lābhe bhavati anjo 'pi kaṣ čid upājo na veti iśvara-pran-
idhānād vā / pranidhānād bhakti-viśeṣād āvarḡita iśvaras
tam anuḡ(i)hātj abhi-dhjāna-matreṇa / tad abhi-dhjāna-
mātrād api jogina āsannatarah samādhi-lābhah samādhi-
phalam ča bhavati // 23 //

atha pradhāna-puruṣa-vjatariktaḥ ko 'jam iśvaro nāmeti ?
kleśa-karma-vipākāśajājir aparāmr(i)śtah puruṣa-viśeṣa
iśvarah / avidjādajah kleśāḥ / kuśalā 'kuśalāni karmāni /
tat-phalam vipākah (...) vāsānā āśajās (...)

tač ča tasjājšvarjam sāmjātišajaja-vinirmuktam / na tāvad
ājšvarjāntareṇa tad atiśajjate / jad evātišaji sāt tad eva tat
sāt / tasmād jatra kāṣṭhā-prāptir ājšvarjasja sa iśvara iti /
na ča tat-samānam ājšvarjam asti (...) // 24 //

Viveka estas la povo distingi la eternan Realon disde la ŝanĝiĝema fenomeno mondo, kiel koncize montras ekzemple respondo de la *paramahansa* [ia ekvalento de mahatmo] Ŝri Rāmkrišno (XIX-a jc.) :

« Kiel la cigno [*hansa*] de la legendo apartigante miksitajn akvon kaj lakton, trinkas nur la lakton sen gustumi la akvon, same la *paramahansa* [« supercigno »] akceptas nur kio estas la esenca* kaj forĵetas kio estas nereala**. »

(*L'enseignement de Rāmkrishna*, Paris, A. Michel, 1972, p.44 ; paroloj kolektitaj kaj prinotitaj de J. Herbert)

* T.e. la *brahman*- [PIV-e : Bramo].

** T.e. la mondo de la fenomenoj. (Notoj de Jean Herbert)

I - *Samādhi*-ĉapitro (sekvo)

(*Spirita sintezo de eŭroplingvaj tradukoj*)

19. Denaskiĝe, iuj konas tian staton : kvankam enkorpiĝitaj, ili estas liberaj de la fizikkorpaj trudoj.
20. Aliuloj ekkonas ĝin [la *samādhi*] per kredo, energio, studado kaj intuicia kono.
21. Tiu stato estas atingebla de kiuj arde deziras ĝin.
22. Tamen eĉ ĉi-kaze, ekzistas diferenco laŭ praktiko diletanta, modera aŭ intensa.
23. Tiu stato [la *samādhi*] povas estiĝi ankaŭ per sindono al la Supera Estajo.
24. *Īsvara* (Iŝvaro) estas aparta estajo, kiun ne tuŝas sufero, ago kaj konsekvencoj de ago.

(*Redaktora laŭvorta traduko el sanskrito*)

19. Denaskan sperton [de la pli profunda *samādhi*, aŭ absorbiĝo] havas la senkorpaj [dij] kaj la [homoj kun mensoj nature] dissolviĝantaj en la substanco.
20. Post fido, heroeco, atento, absorbiĝo, [kaj] gnozo, ĝin havas la aliaj.
21. [Ĝi estas] proksima de tiuj kies interna impeto [estas] intensega.
22. Poste, ankaŭ de la modereco, mezeco, [aŭ] ekscesecco [de la metodo venas] diferenco,
23. aŭ de la kontemplado de la Sinjoro*.
24. La Sinjoro [estas] speciala persono netuŝata de la vehikloj de turmentoj, agoj, [kaj ilia] maturiĝo.

Sanskrita komentario de Vjaso

20. Sperto dank'al metodo¹ estas tiu de la joganoj.

Fido estas serena konfido de la menso. Ĝi do, kiel bonega patrino, vartas la joganon ĉar al tiu ĉi fidoplena celando de la distingopovo² la heroeco venas. Al kiu heroeco plene venis, ties atento ĉeestas. Kaj en la ĉeesto de la atento la menso, kvietaj, fiksiĝas [absorbiĝas]. Al la fiksita [absorbata] menso alproksimiĝas la distingopovo de la gnozo, per kiu ĝi [fakte : la jogano] konas la veran realon.

De la trejniĝo je tiuj ĉi [fido, heroeco, atento, absorbiĝo kaj gnozo] kaj de la indiferenteco antaŭ ĉio, estiĝas la absorbiĝo « sen distinganta konscio »³ (*asamprajñāta samādhi*).

23. – « Ĉu nur de tiu ĉi la samadhio estas pli proksima ? Sed por ĝia atingo ĉu estas ankaŭ alia metodo aŭ ne ? »

– [Jes :] (aŭ de) la kontemplado de la Sinjoro.

Favoriĝita de ies kontemplado, speco de devoteco [*bhakti*], la Sinjoro subtenas tiun per [tiu ĉi] meditado mem [ĝuste laŭ la mezuro de ties intenseco]⁴. Nur de ties meditado mem [ĝuste laŭ la mezuro de ties intenseco], estas pli proksima de la jogano la atingo de la absorbiĝo kaj la frukto de la absorbiĝo.

24. – « Nu, aparta de *Pradhāna* [la aktiva materia kaŭzo de la universo] kaj de *Purusa* [spirita principo, neaktiva efika kaŭzo de la universo], kiu do estas tiu ĉi «Sinjoro» ? »

– La Sinjoro estas speciala (spirita) persono [*purusa*] netuŝata de la vehikloj de turmentoj, agoj [*karma*]⁵ kaj ilia maturiĝo.

La *turmentoj* estas la nescio ktp. La *karmoj* estas taŭĝaj [aŭ] netaŭĝaj [agoj] [aŭ : bonaj/malbonaj]. La *matu-riĝo* estas ilia frukto. La *vehikloj* estas impresajo⁶ (...)

Kaj Lia Sinjoreco [aŭ : dieco] estas libera de egaleco kaj supereco. Ĝi ne estas superigita de alia Sinjoreco kiom ajn granda. Ĝi estas la kiel eble plej supera⁷. Pro tio, kie estas la atingo de la ekstreco de la Sinjoreco, estas Li, « la Sinjoro ». Kaj ne estas Sinjoreco sama kiel tiu ĉi (...)

Notoj

* *Īsvara* signifas : kapabla ; mastro, sinjoro, princo, reĝo ; edzo ; la Supera Est(aj)o ; la supera animo (*ātman-*[ununura sanskrita vorto tradukita kaj per *atmo* kaj per *atmano* en PIV]); kaj plej ofte estas nomo de Ŝivo [PIV-e : Ŝivao], kvankam ĝi povas ankaŭ esti kvalifiko de Indro, Brahma, Viŝnuo, de la dio de amo, (de unu el la Rudroj...).

Laŭ la komentario pri 24, Li estas la ununura Sinjoro.

1/ Alia ebla traduko, disvolvante la tri sencojn de la sama vorto : La joganoj havas la sperton de tiuj ĉi rimedoj de alproksimiĝa proceso.

2/ Pri tiu ĉi koncepto, vidu la enkadritajon sur alia paĝo.

3/ Ĉar kiam la menso « atingas » la esencan mem de la esto, estas nenio alia ekster tio ĉi : en la ununura unuaĵo nenio do estas distingebla, eĉ ne plu restas objekto nek subjekto de kono.

4/ Ŝajnas do ke Vjaso kaj akceptas la ekziston de persona dio kaj samtempe limigas la efikon de ties kontemplado je la nura efiko de la meditado mem, iel do neante dian gracon sendependan de la homa ago. Sed ni ne povas scii kiu estis la penso de Patanĝali mem pri tiu ĉi punkto.

5/ La ĝisnuna PIV-a difino pri karmo estas malĝusta. Jen nova difino proponita de **Gunnar Gällmo** (sveda budhano kiu juis finverkis novan esperantan tradukon de la *Dharmo-pado*, el la palia) : **Karm/o** En hinduismo, ĝainismo kaj budhismo : postrestinta inercio de faro, diro aŭ penso (laŭ budhismo nur se intenca), unu el pluraj faktoroj kiuj influas onian postan vivon. RIM. Multaj okcidentanoj kredas ke karmo signifas « kaŭzoj kaj efikoj », sed la vorto inkluzivas nur la kaŭzojn – la efikoj nomiĝas « vipako ».

6/ T.e. daŭra mensa aŭ pli ofte subkonscia restaĵo de impresoj (eventuale devenanta eĉ de antaŭa vivo), subtila kiel delikata parfumo.

7/ Laŭvorte : « *Kio estus supera, ĝuste tio ĉi estus ĝi* » !

तत्र निरतिशयं सर्वज्ञबीजम् ।

स एष पूर्वेषामपि गुरुः कालेनानवच्छेदात् ।

तस्य वाचकः प्रणवः ।

तज्जपस्तदर्थभावनम् ।

ततः प्रत्यक्चेतनाधिगमोऽप्यन्तरायाभावश्च ।

tatra nir-atiśajam sarva-ḡṇa-biḡam / (25)

sa eṣa pūrveśām api guruḥ kālenānavaścchedāt / (26)

tasja vâcakah pranāvah / (27)

taḡ-ḡapas tad-artha-bhāvanam / (28)

tataḥ pratjak-ċetanādhiḡamo 'pj antarājābhāvaś ċa / (29)

किं च? तत्र निरतिशयं सर्वज्ञबीजम् । यवि-
दमतीतानगतप्रत्युत्पन्नप्रत्येकसमुच्चयतीन्द्रियग्रहण-
मल्पं बह्विति सर्वज्ञबीजमेतद्विबर्द्धमानं यत्र निरति-
शयं स सर्वज्ञः । अस्ति काष्ठाप्राप्तिः सर्वज्ञबीजस्य
सातिशयत्वात्परिमाणवदिति । यत्र काष्ठाप्राप्तिर्ज्ञान-
स्य स सर्वज्ञः स च पुरुषविशेष इति । सामान्यमात्रो-
पसंहारे च कृतोपशयमनुमानं न विशेषप्रतिपत्तौ
समर्थमिति । तस्य संज्ञाविशेषप्रतिपत्तिरागततः
पर्यन्तेष्या । तस्यात्मानुषहाभावेपि भूतानुग्रहः प्रयो-
जनम्, ज्ञानधर्मापदेशेन कल्पप्रलयमहाप्रलयेषु
संसारिणः पुरुषानुद्धरिष्यामीति । तथा चोक्तम् ।
आदिविद्वाग्निर्माणित्तमविष्टाय कारुष्याद्भु-
गवान्परमार्शिरासुरे जिज्ञासमानाय तन्त्रं प्रोवाचेति
॥ २५ ॥

संप्रतिपत्तिनित्यतया नित्यः शब्दार्थसंबन्ध इत्या-
गमिनः प्रतिज्ञानते । चिन्नातवाच्यवाचकत्वस्य
योगिनः तज्जपस्तदर्थभावनम् । प्रणवस्य जपः प्रण-
वाभिधेयस्य चेश्वरस्य भावनम् । तदस्य योगिनः
प्रणवं जपतः प्रणवार्थं च भावयतश्चित्तमेकाग्रं
संपद्यते । तथा चोक्तम्—
स्वाध्यायाद्योगमासीत योगात्स्वाध्यायसामानेत् ।
स्वाध्याययोगसंपत्त्या परमात्मा प्रकाशते ॥
इति ॥ २८ ॥

किं चास्य भवति? ततः प्रत्यक्चेतनाधिगमो-
ऽप्यन्तरायाभावश्च । ये तावदन्तराया व्याधिप्रभूतयस्ते
तावदीश्वरप्रणिधानात् भवति स्वरूपदर्शनमप्यस्य
भवति यथेश्वरः पुरुषः शुद्धः प्रसन्नः केवलोऽनुपसर्ग-
स्तथायमपि बुद्धेः प्रतिसंवेदीयः पुरुषस्तमधिगच्छति
॥ २६ ॥

kim ċa ? tatra nir-atiśajam sarva-ḡṇa-biḡam / jad idam
atitānāgata-pratjūtpanna-pratjeka-samuċċajātindrija
grahānam alpam bahv iti sarva-ḡṇa-biḡam etad vivard-
dhamānam jatra nir-atiśajam sa sarva-ḡṇah

(...)

tasjātmanugrahābhāvepi bhūtānugrahah prajoḡanam
ḡṇāna-dharmopadeśena kalpa-pralaja-mahāpralajeśu
samsārīnah puruśānuddhariśjāmīti / tathā ċoktam /
ādi-vidvān nirmāna-ċittam adhiśḥāja karuṇiḡād bhaga-
vān paramarśir āsuraje ḡḡṇāsamanāja tantram provā-
ċeti // 25 //

sampratipatti-nitjatajā nitjah śabdārtha-sambandha itj
āgaminah pratjūānate / viḡṇāta-vāċja-vācakatvasja
joginah taḡ-ḡapas tad-artha-bhāvanam / pranavasja
ḡpahaḥ pranavābhidhejasja ċeśvarasja bhāvanam / tad
asja jogīnah pranavam ḡpataḥ pranavārtham ċa bhā-
vajataś ċittam ekāgram sampadjate / tathā ċoktam

svādhjājād jogam āsita
jogāt svādhjājam āmanet /
svādhjāja-joga-sampattjā
paramātmā prakāśate // iti // 28 //

kim ċasja bhavati ? tataḥ pratjak-ċetanādhiḡamo 'pj
antarājābhāvaś ċa / je tāvad antarājā vjādhi-pra-
bhr(i)tajas te tāvad iśvara-pranidhānān na bhavanti
sva-rūpa-darśanam apj asja bhavati jathājveśvarah pu-
ruśah śuddhaḥ prasannaḥ kevalo 'nupasargas tathājām
api buddheḥ pratisamvedijah puruśas tam adhiḡaċ-
ċhati // 29 //

25. En Li staras semo de senlima konscio.
26. De ĉiam Li estas la spiritalia Majstro, eĉ de la prauloj.
27. Oni nomas Lin per *Om*.
28. Ripetado de tiu Vorto ebligas eniri Ties signifon.
29. Dank' al tio la periferia konscio interniĝas, kaj malaperas la obstakloj.

(Redaktora laŭvorta traduko el sanskrito - Sekvo)

25. Tie estas la sensupera semo [t.e. fonto] de la ĉioscianto(j).
26. Li [estas] tiu guroo ankaŭ de la prapatroj pro [Lia] nelimigiteco per la tempo.
27. La silabo *Om* signas Lin.
28. Ĝia ripetado ĉeestigas ĝian celiton.
29. Tiam [estas] atingo de la interna spirito* same kiel malestiĝo de la obstakloj.

Sanskrita komentario de Vjasa

25. Kaj kio ? Tie estas la sensupera semo de la ĉioscianto(j)⁸. La semo de la ĉioscianto(j) estas « *tio kio, iomete [aŭ] multe, supersense perceptas tute kaj unuope la estinton, estonton kaj estanton* ». Tio ĉi [estas] kreskanta ; kiam [ĝi estas] sensupera [en iu], li estas ĉioscianto. (...)

Malgraŭ neesto en Li de memkomplezo, (necesaj kaŭzoj) estis Lia komplezo al la estaĵoj. « *Per instruo de la kono kaj devoj [aŭ eĉ religio : dharma], en la daŭroj de la mondoj⁹, mondo-detruoj kaj detruoj, mi liberigos la spiritojn [ankoraŭ : purusa] ligitajn al la transira universo* ». Kaj tiel, estas dirite : « *La origina scienco eklogis en kreita menso, kaj pro kompatado la beatulo, la granda viziulo instruis al Āsuri scivola la doktrinon [tantra].* »

28. « *Pro la konstanteco de la ĝusta kompreno, la ligo inter vorto kaj [ties] celito [aŭ : senco] [estas] konstanta* » asertas la erudiciuloj. Por la jogano kiu konas la preparolaton kaj preparolilon, « *ripetado de io ĉeestigas ties celiton* ». La ripetado de la silabo *Om* kaj [la kono] de kio devas esti signata per tiu ĉi silabo ĉeestigas la Sinjoron. La menso de tiu ĉi jogano kiu ripetas la silabon *Om* kaj estigas kio estas celita per tiu ĉi silabo, fariĝas « unupinta » [t.e. perfekte koncentrita]. Kaj tiel, estas dirite :

« De la ripetado, daŭrigante mensokoncentriĝon, de la mensokoncentriĝo al ripetado oni emu. Per sukces' de l'ripetado kaj de l'mensokoncentriĝo la animo [ātman-] superega riveliĝas, videbliĝas. »¹⁰

29. Kaj kio okazas al li ? Tiam estas atingo de la interna spirito same kiel malestiĝo de la obstakloj. Kiom ajn gravaj estus la obstakloj, malbonfarto ktp. , ili malestiĝas pro kontemplado de la Sinjoro, kaj okazas al li [la jogano] la vido mem de sia propra esenco.

Ĝuste kiel la Sinjoro estas (la) spirito [purusa] pura, klara, absoluta, simpla, same ankaŭ tiu ĉi [jogano] atingas tiun [spiriton] kiu estas la spertanto (returne) de la pensado.

Notoj

* Ankaŭ la alia traduko estas gramatike pravigebla ĉar la sanskrita kunmetaĵo povas esti ankaŭ komprenata laŭvorte: « *atingo de konscio turnita al la interno* ». Sed ni devis finfine forlasi ĝin pro la ĉi-supra Vjasa komentario.

8/ Ĉar temas pri sanskrita kunmetaĵo oni ne povas scii ĉu temas pri singularo aŭ pluralo.

9/ *Kalpa* estas la ekzistodaŭro de unu mondo ; ĝi egalas unu tagon de Braĥmo, aŭ mil *yuga*-ojn, periodojn kiuj mem daŭras po pluraĵn milionojn da jaroj.

10/ En sia eldono de la komentario de Vjasa, Bangali Baba proponas tute malsaman tradukon de la sama *śloka* :

« *Per studo Jogo disvolviĝas ; per Jogo la studo konfirmiĝas ; kaj la Plejalta Memo [Self] riveliĝas per la potenco de la studo kaj Jogo kunigitaj* »**

Sed ĉar Vjasa komentarias sutron pri *ĝapa*, mantroripetado, la vorto *svādhjāya* devas esti komprenata ĉi tie ne kiel studo (per mallalita recitado por si mem de sankta teksto), sed kiel (mallalita) ripetado (por si mem) de la silabo *Om*. Same pri *joga* : ĉi tie ne temas pri jogo ĝenerale, sed, ĉar en *śloka* kiu ilustras la ĵus antaŭe preparolitan « unupintecon » (*ekāgratā*) de la menso, pri unu pli preciza signifo de la vorto *joga* laŭ la vortaro de Monier-Williams: « (*esp.*) *self-concentration, abstract meditation and mental abstraction practised as a system (as taught by Paṇḍjali)* »

** *Yogasūtra of Paṇḍjali with the Commentary of Vyāsa (...)* with copious notes, Delhi : Motilal Banarsidass, 1990 (represita, unua eldono : 1970), p.15 (115 p.) .

Oomoto kaj Esperanto

En 1992 Oomoto (laŭlitere *granda origino*) festis la centjaran jubileon de sia fondiĝo. En 1993 ĝi celebris la 70-an jaron de la fondiĝo de Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto. Memore al tio, EPA organizis la 80-an Kongreson de Japanaj Esperantistoj kun rekorda partoprenantaro : 1 222 homoj, el kiuj 33 alilandanoj el 14 landoj, aliĝis al la kongreso en Kameoka (...)

En 1982 S. MILOJEVIĆ prezentis Oomoton jene :
«*Oni ne trovas facile alian similan ekzemplon en la historio de Esperanto (...) des pli ke la origine japana religia movado Oomoto ĉiam pli kaj pli rolas kiel ponto inter altaj religioj, simile al la rolo, kiun Esperanto volas ludi inter la lingvoj de la mondo.*» (El *Esperanto*)

Oomoto ekestiĝis per la Diposedo, en 1892, de DEGUĈI Nao, 57-jara, en Ajabe, la naskiĝloko de Oomoto. Dio, pere de la sankta medio Nao, la fondintino de Oomoto, deklaris la rekonstruadon de la tuta universo por realigi la Dian regnon. Dum 25 jaroj ekde 1892 ŝi dediĉis sin al la aŭtomata skribado de la revelacioj de Dio, koncerne la alvenon de la Dia Epoko, kies komencaj vortoj estas jenaj :

«*La Supera Mondo kiel Ume-floro nun eknalfermiĝas. Revenis la tempo por Dia Regado. Disvolviĝante kiel Umeo en la plena florado, ĝi estos regata kiel Dia Regno, daŭra kiel Pino ĉiam verda. La Mondo ne plu daŭros sen propra prizorgado de Dio. La Mondo ĝis nun estis je dispono de bestecaj spiritoj kaj diabloj, el kiuj la plifortaj perforte subpremis la malplifortajn (...). Car tiel la Mondo venos al pere, la Prapatra Dio de la Mondo manifestas sin por plenumi Rekonstruadon de la Mondo. Popoloj preparu sin por tio...*»

Jena maksimumo estas la ĉefinstruo: «*Dio estas spirito animanta ĉion kaj la homo estas la administranto de la universo. Tiam unuigas la homo kaj Dio, tiam manifestiĝas senlimaj Diaj virtoj*». Oomoto agnoskas sian mision en tio, ke ĝi servu al la sankta Dia plano per sia tuta entuziasmo por realigi la Dian regnon surtere, strebante en la agadoj de la universala homamo kaj de la kunlaboroj kun ĉiuj eblaj religioj, sin bazante sur firma konvinko pri la samorigineco de la religioj kaj pri la nedisigebla unueco de ĉiuj estaĵoj.

La bofilo de Nao, DEGUĈI Onisaburo, la kunfondinto de Oomoto, ankaŭ ricevis revelaciojn de Dio kaj starigis la bazon de doktrinaro kaj internacie organizis la Oomoto-movadon. Li enkondukis Esperanton en Oomoton laŭ la instruo de la Sankta Skribo : «*La mondo estos unuecigita per 48 literoj de aboco*».

Priskribante ĝin kiel simplan kaj facilan internacian lingvon, Onisaburo mem lernis Esperanton (...) Li deklaris ke li disvastigos tra la mondo la oomotisman per Esperanto, kaj Esperanton per Oomoto.

En 1925, antaŭ ĝuste 70 jaroj s-ro NIŠIMURA Kogecu estis delegita laŭ la ordono de Onisaburo al la 17-a UK en Genevo, kaj varme akceptata, eĉ kiel vicprezidanto de la kongreso. Poste li fondis Eŭropan Centron de Oomoto kaj de la *Universala Homama*

Asocio en Parizo. Li eldonis monatan organon «*Oomoto Internacia*» po 5000 ekz., firmigante multajn amikajn rilatojn kun novaj spirititaj movadoj, kaj sukcese progresigis Oomoton kaj Esperanton, danke al favora kunlaboro de ne malmultaj esperantistoj. La vigla agado de la Eŭropa Centro daŭris ĝis 1935, kiam eksplodis la furioza atako de la japana registaro (...)

En 1945 reviviĝis la Oomoto-movado kvazaŭ fenikso, kaj iom post iom vigliĝadis ankaŭ la Esperanta agado, kiel ekz-e la reeldoniĝo de «*Oomoto*», la re-fondiĝo de EPA kun la organo «*Nova Vojo*». En 1963 okazis la memorfesto de la 40-jara jubileo de Esperanto en Oomoto, kiam inaŭguriĝis la Esperanto-monumento monolita kun jenaj vortoj ĉizitaj sur ĝi : «*Unu Dio, unu mondo, unu interlingvo*». Ĝi koncize montras la ĉefajn direktojn de Oomoto-movado.

Unu Dio staras por tio, ke la vera Dio estas unu, kaj ĉiuj religioj originas el la sama fonto. Pro tio, oomotanoj esperas ke ĉiuj religiaj gvidantoj kaj organizoj vekiĝu por reciproka interkompreniĝo kaj kunlaborado, surbaze de konvinkigo pri la ekzisto de Dio, kiu kreis la universon kaj ĉion en ĝi. Por praktiki tiun ĉi instruon Onisaburo iniciatis fondi la *Mondan Religian Federon* en Pekino jam en 1925, kun ĉeesto de reprezentantoj de Tao-Juan, budhismo, kristanismo, Islamo, taoismo, lamaismo, Bo-ĉong-gjo kaj aliaj.

La interreligia agado ankoraŭ daŭras. En 1993 Oomoto organizis *Preĝoferon kaj Mondan Religiulan Forumon por Eterna Prospero de Homaro kaj Tero* en la nove konstruita preĝejo de Oomoto *Ĉooj-den* en Ajabe, kun ĉ. 300 religiaj gvidantoj el 17 landoj.⁶

Unu mondo signifas ke la tergloblo estas unu eĉ se la homara mondo sur ĝi ankoraŭ ne estas unueciga (...). Nu, urĝegas ke ni disrompu videblajn kaj nevideblajn barojn inter homoj por vere unuecigi la mondon.

Tiucele Oomoto aktive partoprenas en mondfederamovado (...) S-ino DEGUĈI Sumiko, dua spirita gvidantino de Oomoto, unuafoje menciis la mondfederisman movadon en oomoto en 1949 kaj poste akcelis la movadon ĉe ĝia fronto. Tiu iniciato fontas el la Sankta Skribo : «*Ellumigo estas unu ; estas Dia projekto regi la mondon unu*».

Laste «*unu interlingvo*» neniel celas la forigon de ĉiuj naciaj lingvoj sed substrekas la neceson de unu neŭtrala komunlingvo por ĉiuj homoj. Ni bone scias ke la solvo de la monda lingvoproblemo sole ne garantias la mondan pacon, sed ĝi estas unu el la plej gravaj faktoroj, kiuj realigos la veran spiriton necesan por granda homa familio. Jen kial Oomoto enkondukis Esperanton en sian movadon jam en 1923.

AGOU Takaŝi (mallongigite de la Red.)

Se vi deziras pli detale scii kio estas Oomoto, ekzistas duonhora vidbendo en Esperanto kun temo *100-jariĝo de Oomoto kaj Esperanto, 1992* (kostas 2000 enojn + sendkosto). Bv tumi vin al Internacia Fako, Oomoto, Ten'on-ĵjo, Kameoka-si, Kyoto-hu, 621, Japanio. Fakso : +81 (71) 25-0061.

Lettre ouverte

Vous étiez une poignée de porteurs de lumière
accrochés au flanc de la montagne si fière
Remplis d'amour et de don total de soi
Qui répandiez par le monde votre message de foi

Ils ont voulu effacer votre mémoire de la terre
Mais n'ont pas su que nous étions tous frères
Que la mort jamais n'existera
Que la vie dans nos cœurs toujours bat

C'est ainsi que tu verras aujourd'hui sur la montagne si fière
Cheminer vers le symbole vivant de la lumière
Conscients ou pas des milliers de nos frères
Chercheurs du secret de notre unité première

Mais l'unique clé pour nous ouvrir les portes de l'éternité
C'est dans notre propre cœur qu'il nous faudra la chercher

Tiu ĉi poemon ni trovis en la preĝejo de la vilaĝo Montségur, piede de la monto al kies pinto ankaŭ ni grimpis triope : juna *brahma-kumarano* (kies artikolon vi povos legi en la venonta numero...), 90-jara heroa dominikana frato kaj la redaktoro. Ĉar fakte la redakto ĉi-somere fariĝis kvazaŭa interreligia centro, kun restadejo ankaŭ de tibetbudhista eŭropanino, de luterana germanino, de *Arès*-pilgrimulo kiu multe helpis per reviziado kaj artikoletoj (...ankaŭ ili por la venonta numero !), de itala neplukatoliko kiu tamen korektis italan tradukon de flugfolio pri sankta Volusiano : Foix celebros, la 22-an de oktobro, la 1500 jarigon de la alveno de sia sankta patrono. En lia honoro ni tradukis ankaŭ en esperanto la kvarpaĝan prezenton (haveblan skribante aŭ al la redakto aŭ, pli bone rekte al : Parioisse de Foix (Jacqueline), 5 rue Mouragues, F-09000 Foix).

Letero

Pri gnostikoj : Helpon ! Oni sieĝas min

Kiam mi estis juna, mia problemoj estis la eliro el fermita kamparana kulturo kiu estis trempita kaj en la dogmoj de la katolika eklezio kaj en amaso da magiaj kredoj. Tiam Volter savis min, kaj de tiam mi klopodis resti raciisto kaj iluministo*.

La afero funkciis tre bone dum longa tempo sed ĝi ne plu funkcias de almenaŭ unu jardeko. Mi abunde priridis homojn kun religiaj, mistikaj kredoj. Tiuj ĉi objektivaj ŝajnis al mi stultaj sen iu ajn scienca pruvo. Mi neniam estus povinta eĉ imagi ke en la fino de la 20-a jc. vastaj triamondaj popolaj amasoj serĉos sian vivpliboniĝon pere de mezepoka religio. Kaj tamen...

Dum la lasta jardeko mi estas ĉiam pli ĉirkaŭata de junaj homoj, kiuj sincere kredas je tio kio al mi ŝajnas ekstermondaj iluzioj. Mi klopodas kompreni, sed mi ankoraŭ ne sukcesis. La lastan ekzemplon liveras al mi la *Asocio Gnostika por Antropologiaj kaj Kulturaj Studoj* kun kies roma sidejo kunlaboras kelkaj, cetere inteligentaj, esperantistoj.

* Sekvo de lia 300-a naskiĝdatreveno, lia « *Konfeso de la Teistoj* » aperos en venonta numero. (Nota de la Red.)

Ĉu vana espero ? **Publika letero**
de nuna Montségur-anino Marie-Ange
al siaj spiritaj amikoj kaj fratoj :
al la monseguraj Kataroj - ĉu lastaj ?

Vi estis areto da Lumo-portantoj
rifuĝe ĉe l' pinto de l' monto fiera,
plenplenaj de amo kaj de sindonemo,
blovantaj en mondon mesaĝon de fido.

Volante forviŝi memoron de l' tero,
nu ili ne sciis ke fratoj ni ĉiuj
ja estas, ke l' morto neniam ekzistos,
viv' via en koroj ankoraŭ batadas :

hodiaŭ mi vidas sur l' monto fiera
alpaŝi l' vivantan simbolon de Lumo
amasoj da fratoj, konscie - aŭ eĉ ne ! -
serĉante l' sekreton de l' hom-unueco.

Sed la ununuran ŝlosilon povantan
malfermi la pordojn de la eterneco
profunde en propra animo kaj koro
ni devos serĉadi por - eble - ĝin trovi.

Ĉi tiu asocio celas ŝanĝi la homon konigante al li/ŝi sintezon de la mistika mesaĝo de ĉiuj religioj, kaŭzante la morton de la egoisma mio kaj la naskiĝon de nova homoj, kiu pretas ripari siajn egoismajn agojn per malegoismaj agoj favore al la homaro.

Ĉi tiu asocio, originanta en Meksikio, disvastiĝadas tra Eŭropo kaj kaptas ĉiam pli da junaj homoj, kiuj evidente serĉas ion kion la tradiciaj pensofluo ne kapablas doni. Ili petis min verki artikolon por kontakti kun aliaj esperantistoj kiuj interesigas pri spiritaj temoj. Tion mi faris.

Eble legantoj de Asistilo estas la ĝustaj homoj por kontakti kun ili kaj savi ilin el la tre banale raciisma etoso de la roma Esperanto-grupo. Kaj eble, sekvante ilin, ankaŭ mi iam komprenos ion pri ĉi tiu demando-plena malrealaj realaĵoj.

Renato Corsetti

La adreso (al kiu vi skribu en esperanto) estas :
Associazione Gnostica di Studi Antropologici e Culturali,
ĉe José Maria Gutierrez, Via Cremona 30/20, I-00161 Romo.

Kolombia « taoista majstro » (fino ?)

Malgraŭ la inspiritaj mesaĝoj kaj ekzemploj de ĉiuj profetoj la homa raso daŭre inklinas al la malbono. Kial, vi vin demandas ? Ĉar ĝia degenerado estas ĉizita en ĝiaj genoj. Do, ĉu nekuracebla malsano ? Ne, ekzistas naturaj teknikoj, (TAO-devenaj), por ŝanĝi la genan programon.

Ni estas la diferenco inter kio eniras nian korpon kaj kio eliras el ĝi. Ju pli pure ni nutras nin kaj ju pli intense ni eliminis la toksinojn produktitajn de la metabolo, des pli puraj estas nia korpo kaj la ĉeloj kiujn ĝi produktas.

Tial, gravas la vegetara dieto kaj la engluto de mikseblaj nutraĵoj en ĉiu manĝo. Ni ankaŭ ricevas energiojn per la enspirado, per la sunradiado kaj aliaj radiadoj el la Tero kaj la kosmo. La eliminado efikas per fekado, la elspirado kaj la ŝvitado. Intensaj fizikaj ekzercoj stimulas tiujn tri funkciojn.

Se paralele al tio, ni zorgas pri la pureco de nia parolo kaj pensado, ni sukcesas plibonigi nian genan programon. Ĉiuj agoj, paroloj, pensoj niaj estas registritaj en niaj genoj. Se ili estas negativaj, ili preparas la terenon, ili programas venontajn negativajn agojn, parolojn, pensojn. Se ili estas pozitivaj, ili programas pozitivecon. Iom post iom, niaj difektoj transformiĝas en virtojn. Nia korpo puriĝas kaj fariĝas kio ĝi neniam devintus ĉesi esti, tio estas la templo de Dio.

Tie kuŝas la konfuzo kiu estas ĉe multaj religioj. Ili ŝerĉas Dion, sed tute ne scias kie trovi Ĝin¹ kaj kia (Ĝi) aspektas. De la komenco la diaj energioj estis kun ni sed pro degenerado ili ne plu manifestiĝas en korpo kiu detruigiĝas per kontraŭnaturaj kutimoj, en laringo kiu blaŝfemas. La diaj energioj estas tiel altensiaj ke la degenerita homa korpo ne rezistus ilin.

Kroma fonto de energio estas en ni mem, same kiel la atomo eligas grandan ententan kvanton da energio kiam ĝi estas rompata, aŭ same kiel gaso kiu kondensiĝas, liberigas varmon. Tiu energio estas la seksa energio kiun la homoj kontraŭnature perdas kiel eble plej ofte ili povas. Tiu energio estas vitala energio, la plej sanktega kaj la plej potenca energio kiu ekzistas. Ĉiu homo havas en si potenciale la kapablon generi la tutan loĝantaron de la Tero. Kia povo !

Tiu kiu anstataŭ forjeti tiun energion saĝe transmutacias ĝin, fariĝas templo de Dio kaj akiras kapablecojn eksterordinarajn.

Eble vi pensas, kie temas pri Taoismo ? Estu paciencaj (= scienco de la paco !). Sciue ke la (TAO) ne estas Terdevena sed estas kosma principo pli praa ol la Tero mem. Kristo inter aliaj profetoj estis praktikanto de la TAO. Tial la Biblio estas plenplena de TAOismaj instruoj³.

La majstro pri Esperanto

Eble vi ŝatus scii ion pri la sento de la majstro koncerne Esperanton. Antaŭ kvin jaroj, kiam mi prelegis antaŭ liaj misiistoj, la majstro reagis tre favore kaj instigis la TAOistojn lerni Esperanton. Li profetis gravan rolon por Esperanto en la estonteco kaj, krom rivelado pri la deveno de la lingvoj, li sciigis al ni ke Esperanto estas mantro, kiu helpas nin transformi niajn difektojn en virtojn, kaj ke Zamenhof estis inspirita de superaj energioj por plenumi sian mision⁴.

Li invitis la skeptikemulojn retrolegi la nomon de Zamenhof : Ĉu estas hazardo, ke li nomiĝis FOHNE-MAZ (fonetika formo de fonemoj, en la hispana).

Dum mia nuna restado, la majstro permesis al mi instrui Esperanton ĉiutage al la infanoj de la TAO-lernejo kaj al misiistoj. Tio signifas ke ĉirkaŭ 200 personoj sekvis la kurson. Pro oftaj eliroj el la monaĝejo, la plimulto ne regule partoprenis. Tamen ĉirkaŭ 50 el ili baldaŭ kapablos paroli Esperanton sufiĉe flue.

Antaŭ nelonge la majstro vizitis la kurson kaj li liveris novan doktrinon⁵ pri la origino de la lingvoj. Li diris ke ĉiuj lingvoj, kvankam devenaj el pura lingvo kiu ekzistis antaŭ la evento de la Babelturo, aliĝis, malpuriĝis, mallogikiĝis ĝis la punkto ke hodiaŭ ĉiuj estas plenplenaj de blasfemoj. Tial jam de pluraj jaroj li komencis purigi la hispanan (vidu la Bibliion, Cefanja 3,9) aŭ pli ĝuste la kastilian (castellano en la hispana, t.e. ano de Castilla = « anuso de Kastilio ») uzatan en Latinameriko⁶.

Multaj vortoj sub influo de Teranoj (« anusoj de la Tero » ?), inspiritaj de negativaj energioj, perdis la originalan purecon kaj fariĝis elvoko al la malbono kaj la vulgareco.

La majstro klarigis ke ĉiu vorto, kiam ni elparolas ĝin, transformiĝas en sonon, tio estas ondoj aŭ vibradoj. Tiuj ondoj havas efekton en nia mensuro. Pro tio en orientaj religioj ekzistas (mantraj), tio estas vokalaj, vortoj aŭ grupo da vortoj ripetindaj, kies vibrado estas konsiderata kiel plibonigo de la spirita stato de la elparolantoj kaj aŭskultantoj.

Fakte ĉiu vorto estas mantro kaj ĉiu mantro estas alvoko. Se vorto estas ŝargita per negativeco, kiam ni elparolas ĝin ni alvokas negativajn energiojn, kiuj pro tiu alvoko vekiga kaj manifestiĝas en nia vivo eĉ se ni ne konscias pri tio.

Li konfirmis do ke Esperanto estas ege sanktega kaj entenas multe malpli da blasfemoj ol la aliaj lingvoj kaj estas pozitiva mantro kvankam estis pluraj elementoj negativaj kiuj estis ŝovataj en ĝi kaj do modifendaj.

majstro » (fino ?)

Ekzemple la prefikso *mal* en multaj lingvoj rilatas al la koncepto *malbono*. Tial *mal* estus avantaĝe anstataŭota per la prefikso (*jin*), kiu pli ĝuste spegulas la universalan (kaj TAO-istan) koncepton ke en la kosmo ĉio havas en si la ĝermon de sia (mal) (jino !). Tiu modifo havas ankaŭ la avantaĝon pliaziigi esperanton. Aliaj modifoj povus plibonigi la vibradon de la mantro Esperanto, sed estos temo de postaj informoj.

« Per iliaj fruktoj vi konos ilin »*

La TAO-eklezio rapide disvastiĝis dum la kvin lastaj jaroj en Latinameriko kaj mi povis konstati la plibonigojn kiujn la instruoj de la majstro ebligis. Liaj sekvantoj rapide evoluis fizike kaj spirite. Ŝajnas ke li sukcesis fortranĉi el la genoj de la Latinamerikanaj loĝantoj la kutimajn difektojn iliajn. Ili modele sin kondukas okaze de la komuna kunvivado ; estas pli respektemaj al (la Patrino naturo) ; akiris puran parolon kaj eksternormalajn konojn pri medicino, agrokulturo ; celas purecon en ĉiuj aspektoj de la vivo. Tio estas la TAO. Ĝi estas en ĉiu ago, penso, parolo de la ĉiutaga vivo.

Mi deziras al vi entuziasmon (= *endioziasmo*) : havi la inspiron de Dio en si, laŭ la greka *enthousiasmos*) en ĉiuj viaj agoj, paroloj kaj pensoj.

Werphaplus (Philippe Chavignon)

1/ Pri Ĝi vidu la Biblion : Genezo 1,27 : « Kaj Dio kreis la homon laŭ Sia bildo (...) en formo de viro kaj virino Li kreis ilin ». Same vidu la TAO-koncepton *jin-jang*.

2/ Vidu la Biblion, Galatoj 3,16 : « (...) Kaj al via semo kiu estas Kristo », kaj la unuan epistolon de Johano, 3,9 : « (...) Ĉiu kiu naskiĝis de Dio ne faras pekon ĉar lia semo restas en li ».

3/ Pri tio kaj aliaj punktoj de tiu artikolo mi povos detali en venontaj numeroj de Asistilo.

Mallonga reago de leginto

Pro mia restado en Balagué, Christian legis al mi la ĉi-supran tekston por havi mian opinion. Mi trovas en ĝi intereson de preciza sperto, kaj plurajn valorajn ideojn, el kiuj kelkaj jam apartenas al la komuna posedajo de la spirite evoluinta homaro. Entute la artikolo estas pensiga.

Tamen mi kritikemus unu evidentan eraron kaj nuancus du aferojn :

1/ En la citaĵoj de la *Nova Testamento* « semo » neniam signifas *spermon* sed, laŭ la judaj konceptoj, plej ofte *idaron*.

2/ La uzo de la vorto « genoj » por klarigi la nuan degeneradon de la homo povas elvoki eŭgenismajn, eĉ rasismajn kaj eksternajn sintenojn.

4/ Konfirmata de Zamenhof mem : « Panjo, vi ĉiam diris ke Dio difinas por ĉiu homo taskon kiun ĝi devas plenumi dum sia vivo. Eble, eble... per tiu tasko kiun mi trudis al mi, mi estas plenumanta la mision de mia vivo. » (El *La vivo de Zamenhof*).

5/ Doktrino : ne laŭ la mallauda PIV-a difino sed laŭ la originala latina *doctus*, de *docere* : instrui. [Ĉu la PIV-a difino vere estas mallauda ?]

6/ Ekzemple en la hispana la vorto *tabernakulo* (tabernaklo) elvokas la *culo*-n de la *taberna* (postajo de la taverno), stranga templo ĉu ne ? La vorto *trabajo* (laboro) elvokas la malaltecon (*bajo*) kaj ne spegulas la fonton de pozitiveco kiun la laboro havigas. La vorto *normal* (normala) elvokas la malbonon (*mal*) ; tio sugestas ke la normaleco estas ligita al la malbono. Tio pravigas la aserton pri la karcer-sfero* sur kiu ni loĝas.

La korektita lingvo nomiĝas « *kastesakro* » (t.e. ĉasta kaj sanktega, anstataŭ « anuso de Kastilio ») kaj la respondataj korektitaj vortoj estas *tabersakro*, *traalto*, kaj *norbien* (= *norbone*). La fonetiko de la *kastesakro* estas pli regula ol tiu de la *castellano*, kaj pli similas al tiu de Esperanto.

* Vidu la unuan parton de lia artikolo en n-ro 16 p.28 . Mi cetere devas atentigi ke la noto 3 estas fakte bazita sur erara etimologio (do eĉ se la majstro « liveras sciojn ofte nekonatajn » kun « nehoma flueco de la parolkapablo » ŝajnas ke li tamen povas ankaŭ erari kelkfoje...) : François Degoul, agregaciulo pri malnovaj lingvoj, precizigas ke la vorto planedo ne venas de la latina radiko *plan-* = eben-, sed pere de la latina (*planetae* aŭ *planetes*), de la greka *planētēs* aŭ *planētēs*, vortoj kies signifo estas «erarvaga» : ĉe Platono oni trovas la esprimon *astra planēta*, erarvagantaj astroj, tio estas planedoj. (Simila klarigo jam aperis en la tria « *redaktista noto* », de d-ro Bradio Moro, pri alia artikolo de Philippe Chavignon, titolita « Intuicia Taoismo », en *Tao* n-ro 3 (printempo 1995) p.4-11 ; en kiu cetere aperis alia traduko, per A. Mechelynck, de ĉapitro el *Gargantuo* antaŭe publikigita en *Asistilo* n-ro 16 p.11) .

7/ Signo de la egocentrismo de la eŭropanoj. Ni devus diri : « oriente de Eŭropo ». La nura vorto *orienta*, laŭ vidpunkto el Azio, elvokas la Amerikojn !

8/ Biblia citaĵo el Mateo 7,16 .

3/ La ideo pri ŝpando kaj « transmutacio de la sekssa energio » meritus malpli suprajn konsiderojn : ĝis kiu grado eblas tiu *transmutacio* ? Kiel trovi ĝustan ekvilibron ? Kompreneble evitindas malŝparado de nia mirinda seksenergio. Inverse, ni ne hipokrite kredigu ke *natura uzo* de tiu energio estas malbona. Per tiu kredigo ŝajnas al mi ke sektaj kaj ekleziaj celas (aŭ -is) precipe kulpigi la homojn por ke ili sentu sin pekuloj kaj submetiĝu al sekta(j) aŭ religia(j) majstro(j) al kiu(j) oni atribuu la imagitan perfektecon de sekssa ŝparado. Pri tiu ampleksa problemoj, kiuj enhavas ekologiajn, spiritajn kaj sociajn aspektojn, mi eble havos okazon pliprecizigi mian penson.

François Degoul

Dua falo de la homaro (sekvo)

laŭ la *Ora Rozokruco**

Ni jam atingis la sesan tagon de la kreado, kiam la *elohimoj* diris: «Ni faru la homon laŭ nia bildo kaj simila» [Gn 1,26]. La homo jam estas sur la tero.

(...) Memoru ke la *dialektika mondo* estis kreata por helpi nin, membrojn de la *falinta homaro*, perdintojn de la «*Unua Paradizo*», en nia pilgrimado al la patra hejmo, al la ne-ĉi-monda regno; pilgrimado kiu komenciĝis ĝuste en la *dialektika mondo*, aŭ *densa materio* kiel ni ankaŭ povas nomi ĝin.

Se, perdinte la Unuan Paradizon pro nia centripeta, egoisma sinteno, ni multon forgesis pri nia origina gloro, imagu kiom multege pli ni devis forgesi pro nia eniro en la densan materion (la kaverno de Platono), kaj pro nia enkarniĝo en ia fizika korpo.

La *adamoj*¹ ne posedis individuajn konscion, sed *oceanan* konscion. Ili ne vivis kiel individuaj gutoj, sed kiel tuta oceano. Ili vivis sed ne kapablis sin demandi ĉu ili ekzistas. Ankaŭ la infanoj en iu periodo de sia vivo spertas la oceanan konscion. Ili ne diras: «*Mi soifas, mi malsatas*» sed «*La infano soifas, la infano malsatas*». Dum la infanoj konservas sian navecon, sian revemon, sian kapablon miri, admiru, kredi, fidi, gapi, ni diras ke ili ankoraŭ ne perdis la *paradizon*.

Tio ĉi okazas laŭ mi kiam komenciĝas la pubereco, ĝuste kiam aperas *Eva*²! Je psikologia nivelo, Eva simbolas la *sentan* aspekton ĉe ni (pasioj, deziroj, sentoj kaj emocioj), kaj Adamo simbolemas la *mensan* aspekton, konkretan kaj abstraktan pensadon. Do en ni ĉiuj kunekzistas Adamo kaj Eva. En siaj plej altaj funkcioj Eva transformiĝas en *Sophia*. Do la sentemo povas konduki nin al Saĝo; la pensemo (la mensa aktiveco) kondukas nin al kono. En nia ĉiutaga vivo ni povas reprodukti la falon de la homaro. Kiam ni eniras magazenon kaj aĉetas bagatolaĵojn, ni *falas*: Eva (la deziro) instigas Adamon, kaj Adamo cedas.

La apero de Eva konsciigis Adamon pri lia individueco, pri lia mi-eco, pri lia kapablo «*deziri* ion por si mem». Li ne plu estas infano kiu vivas en la oceanna konscio, sed puberulo kiu konscias pri si mem, kaj kiu avidas la posedon de, la kunfandiĝon kun Eva (...)

La *elohimoj* metis la unuan *geparon* en la ĝardenon de Edeno, la Teran Paradizon³, kie regis *eterna printempo*. Inter la multspecaj fruktonoj arboj de la Tera Paradizo, estis du tre rimarkindaj: la *Arbo pri la Vivo* kaj la *Arbo pri la Kono de bono kaj malbono*. Dio permesis al la geparo manĝi la fruktojn de ĉiuj arboj de la Paradizo, escepte tiujn de la *Arbo pri la Kono de bono kaj malbono*. Laŭ la esotera simboligo, *manĝi* signifas lerni ion, asimili ion, kompreni ion, *konsciigi pri ion*. La Tera Paradizo reproduktis, kvankam pli densigitan, la harmonian vibrokampon de la Origina, ne-ĉi-monda Regno, kaj tian vibrokampon simbolas la *Arbo pri la Vivo*. Do manĝi la frukton de tiu ĉi *Arbo* signifas resti en la naiveco, la feliĉo, la

komprenebleco, la epigeneza [?] libereco kiu ne kontraŭdiras la dian volon, la Origina Regno. La *Arbo pri la Kono de bono kaj malbono* simbolas la *dualecon*, dupolusecon de la *dialektika mondo*, la neceson «*decidi* inter du eblecoj», «*erari / trafi*».

Ĉar la Tera Paradizo reproduktas la kondiĉojn de la «*Origina Regno*», sed plurajn oktavojn malsupre, *Helena Petrovna Blavatsky*⁴ diris ke Adamo (la androgina homaro) estis feliĉa kaj saĝa, sed ne «*konsciis pri tio*»; ĝi vivis en la «*imbecila (mensmalfortika) beateco*»; kaj J. Krishnamurti asertis ke Adamo estis «*nekonscia perfektulo*».

La apero de Eva simbolas la deziron, la strebon al memkonsciigo⁵ de Adamo pri siaj feliĉo kaj magiaj povoj. Oni diras ke la diablo, pere de la serpento, diris al Eva: «*Se vi manĝos la nepermesitan frukton, viaj okuloj malfermiĝos kaj vi estos kiel Dio*». [vd Gn 3,5]

Denove la sama afero: esti *kiel Dio* anstataŭ esti *en Dio*. Denove la sama centripeta sinteno, la sama egoismo, la sama izoligeemo! Pro la incito de Eva (la deziro), la geparo manĝis la nepermesitan frukton. Iliaj okuloj malfermiĝis. Ili hontis pri sia nudeco kaj sin kovris per folio de vitlaŭbo [?]. Ili denove falis, sed ĉifoje en la *dualecon de la dialektiko*. Pro ilia izoliga egoismo ili perdis la intuician spontaneecan komprenkapablon...; ili perdis la duan Paradizon!

Ekde tiam ni, la malfeliĉaj membroj de la dufoje falinta homaro, ĉion devas lerni laŭ la empirisma vojo de «*provo kaj eraro*» kaj sub la jugo de la leĝo pri kaŭzo-efiko, semo-rikolto, ago-reago; la leĝo pri *karma*, kiel diras la orienta esoterismo; la leĝo de Taliono, kiel diras la Biblio: okulon pro okulo, denton pro dento, manon pro mano, piedo pro piedo!

Jozefo Gomez Ibars

Notoj

* Adr.: Bakenessergracht 11-15 20 M, NL-JS Haarlem.

1/ Ni rimarku ke, laŭ la universala esotera tradicio *Adamo* ne estas la nomo de individua homo, sed de homa raso.

2/ Priskribi la metodojn per kiuj la *elohimoj* kreis kunulinojn por la soleca Adamo ne eblas ĉi tie. Sed vidu ekz-e Max Haendel: *Rozokruca koncepto pri la kosmo...*

3/ *Paradizo* signifas «*apartigita ĝardeno*».

4/ Nek en PIV nek en ties *Supl.* Nu en latinaj vortaroj troviĝas nur *Epigenes* (greka aŭtoro). En grekaj vortaroj ankaŭ *epigenetos*: okazinta poste, ktp. En grekaj kunmetaĵoj *ĉpi* estas signife plureca. En ĝiaj sencoj lokaj: *sur, meze de*, *ĝis, kontraŭ*; tempaj: *sur, post*; rilataj: *cele al, pro*. Tia dubasence neologismo ŝajnas do tute evitanda. (Red.)

5/ Fondintino de la *Teosofia Societo* en 1875.

6/ Pleonasmo: *konscio* jam estas scio pri si mem. (Red.)

7/ Tiu esprimo ne troviĝas en la Biblio (almenaŭ ne en *Levidoj* 24, kie estas skribite «*(...) oni faru al li tiel kiel li faris: rompon pro rompo, okulon pro okulo, denton pro dento; kian difekton li faris al homo, tian oni faru al li.*» (19-20, laŭ la (reviziita) Zamenhofa trad.). La vorto *talio/talionis* ne estas persona nomo, do ne devus komenciĝi per majusklo, sed latina vorto deveninta de *talis*: «*tia*». (Noto de la red.)

Letero(j) pri pluekzistado de ASISTI

[Dum UK] Eva kaj mi, parte ankaŭ kun Pascal Lécaille (taskigite de Christian) interparolis pri stato kaj ebla sorto de ASISTI. Sekve jen mia starpunkto.

ASISTI estiĝis miavide per la impeta klopodado de Christian (...). Por *Asistilo* principe ne bezonatas asocio (...). Asocio miaopinie sencas nur kiam konsiderinda kvanto da homoj sam- aŭ almenaŭ sufiĉe simil-direkte aktivas, kaj indas kunordigi ilian agadon, kaj se krome tiu aktivado celas al kunlaboro kun iuj asocioj aŭ instancoj por kiu indas aŭ eble nemalhaveblas povi mem prezentiĝi kiel asocio respektive ties reprezentanto. Rilate interreligiajn agadon en Esperantio mi ja vidas nepre la sencon de tiu. Mi ankaŭ povas bele imagi kiel esperantistoj povus reprezentiĝi ĉe la diversaj interreligiaj organizaĵoj krokodilaj kiuj jam ekzistas tra la mondo kaj montri al ili kiel ni esperantistoj modele interkomunikadas juste, egalece kaj senĝene per neŭtrala, plentaŭga planlingvo. Tamen, mi tute ne vidas la konsiderindan kvanton da homoj kiuj pretus kaj kapablus tiudirekte aktivi.

(...) Se reprezentiĝo ne okazas sisteme kaj regule ni fine nur damaĝas la reputacion de nia kara lingvo resp. ties uzantokomunumo. Kaj kiel oni povas sin senti reprezentante dudekon da membroj ?

(...) se ankaŭ ne sufiĉas la homfortoj por fari ian eksteran agadon kiu meritus sian nomon (...) mi simple konkludas ke je la nunaj kondiĉoj ASISTI simple ne vere bezonatas (...). Mi ne pledas por la ekzisto de ASISTI – mi simple lasus ĝin bele dormi ĝis eble iam la fortoj sufiĉos por reveki ĝin, teni ĝin vigla.

Nun pri la ISE : La unua estis sufiĉe spontanea ideo de Pavla kaj mi kaj kune kun Vladja ni ja sukcese ĝin organizis. Mi mem ne planis ĝin daŭrigi. La partoprenintoj tamen decidis aliel, kaj troviĝis Eva kaj Erika por organizi duan (...). Ĉu tria okazo ? [vidu 1]

Mi plene konsentas kun vi Pavla, ke :

«por ke ASISTI estiĝu vere vivanta kaj reale utila asocio, necesas ankaŭ ĝia ekpaŝo eksteren kadre de Esperantujo, ĉar nur tiel ĝi povos ekhavi pliajn kompetentajn kaj espereblajn agemajn membrojn. Ĝi devas realigi siajn celojn ne nur pere de Asistilo, sed ankaŭ - kaj ĉefe - per renkontiĝoj kaj eventuale postaj personaj kontaktoj inter «ĝemelitaj animoj» (...) Se ni vere havas la intereson daŭrigi okazigon de ASISTI-seminarioj, ni devas serĉi taŭgan platformon por ĝia fruktodona disvolvado, por ke ni ne nur agrable (kaj malplene) ree kaj ree babiladu pri tio, ke en ĉiuj spiritaĵoj instruoj ekzistas komuna kerno kaj kiom tio belas... » !

(...) Tion oni povas unufoje fari, kaj tiam ĝi ja vere belas kaj povas estis eĉ ia revelacio por iuj... [2]

Kio **konklude** ? ASISTI-n ni lasu dormi (...) La kampo interreligia en Esperantio ja plu lamentinde dezertas kaj multo farendus kaj eble fareblus, se troviĝus la taŭgaj kaj emaj homfortoj... Mi antaŭdankas por viaj reagoj.

Bernhard Westerhoff

Ni pardonpetas ke pro la graveco de tiu(ĝ) ĉi, ni devis prokrasti publikigon de multaj aliaj leteroj de legantoj i.a.: J. Karhan (CZ), G. Gällmo (S), U. Matthias (D), Z. Mjeda (Albanio), E. Marzola (I), R. Lecat (B, Egiptio)... (Red.)

Reage (el sekr.-letero al la Prez. 12-8-95)

Mi timas ke la kasraporto seniluziigis Bernhard (...) ĉefe pro tre malgranda nombro de **formalaj** membroj. Mi do tuj aldonas (...) ke certe multaj aliaj rigardas sin kiel membrojn de ASISTI, sed nur ne konsciis ke ili devas **aparte menci**i sian membriĝo-volon kiam ili sendas monon (ĉefe por aboni *Asistilon*).

Kiel provon respondi mi nur diros ke *Asistilo* bezonas ASISTI por pluvivi. Granda parto de la abonoj alvenas fine de niaj kunvenoj, kaj kvankam mallaborema ASISTI-sekretario, mi ĉerpas multe da energio por la redaktado el la fakto ke ni estas asocio : la ricevantoj de la asocia revuo estas pli ol nuraj legantoj, ni ĉiuj estas membroj de la sama korpo. Tial multaj ĝin ricevas senpage, kio estus eldonista stultajo el financa vidpunkto, se mi ne sentus ke ĉiu siamaniere provas kontribui al la sama celo de interkompreniĝo.

Mi ĝojas ke Bernhard povas denove organizi IRKE. Ĝi okazu, antaŭanoncita kiel UKa programero * ni trovu prelegetantojn el diversaj religioj pri difinita temo kun tempo por libera diskuto inter la partoprenantoj ; aparte okazu « *komuna silentado* », sen ia religia aspekto por ke ĝi estu malfermita al ĉiuj (tio bone sukcesis en Valencio, laŭ decido de ASISTI-kunveno en Tabor).

1/ Jes ja, ĝi nepre okazu ! Pavla jam bone ekpreparis ĝin, eĉ se ŝi ŝanĝis la temon malgraŭ la decido en Szombathely : ŝi estos kompetenta pri ĝi kaj estas la kunordigantino, do kvankam maldemokratiete, ni lasu al ŝi la finan elekton. Mi tamen ŝatus ke oni kaptu la okazon por pli faka laboro pri la terminologia vortareto : tute sufiĉas « *baza skeleto kiun oni devos komune tralegi, korekti, kompletigi, elstreki ktp.* » Jen praktika kunagado kaj « *intensa tema laboro* » ! (Tio povus enŝoviĝi en la programo dum liberaj tempoj).

La dua ISE venigis 27 samideanojn (anstataŭ « *tridek* » al la unua), preskaŭ tute sen anoncoj en la gazetaro. Plie tiuj du unuaj ISE estis en aparta loko kaj tempo, sen rilato kun alia esperanta evento : tuj post (?) la UK kaj samloka, en la 3-a probable partoprenos multe pli da homoj, se anoncote sufiĉe frue.

2/ Tute ĝuste ! Sed ĉiam, kiel en la UK-oj, venas partopreni novaj homoj por kiuj estas la unua fojo : ĉu ni ne donu al ili la eblecon de ia sama revelacio ?

Pri aliaj utiloj de la asocio : la aliĝo de ASISTI al IARF ne eblus se la asocio ne ekzistus ! Kaj mi ne povus reprezenti ĝin al la 6-a monda sesio de WCRP : tiam mi reprezentis ne nur « *dudekon da [formalaj] membroj* », sed ankaŭ kvincenton da legantoj de la asocio « *Ligila Organo* » (n-ro 16 estis presita 590-ekzemplere). Se nia reprezentiĝo ankoraŭ ne estas « *sistema kaj regula* », multaj junuloj (kaj ankaŭ plenkreskuloj) jam ŝatas niajn tri sinsekvajn partoprenojn en interreligiaj aranĝoj, en Bangaloro (aŭgusto 1993), Cluny (sept. 1993) kaj Riva del Garda (nov. 1994) kie bonŝance estis alia esperantisto (Bahaano el Berlino).

* Jam du membroj de WCRP-Junularo vizitis « *Le Presbytere* » dum kelkaj tagoj en julio, kaj unu el ili, germanino, ekinteresiĝetis pri esperanto.

** ASISTI-jarkunvenoj kaj IRKE ĉe UK-oj, kelkaj kunvenoj dum IJK-oj, kaj ISE-oj.




NOVA SIMBOLO

por Jerusalem estas ponto ligante la Superan Juĝejon kun la Nacia Placo. Tiu ponto, kiu nun ornamas la enirejon de la Sankta Urbo, povus eble ankaŭ simboligi nian celadon al PONTA (lingvo kaj) religio laŭ la malnova revo de Zamenhof. Iom kosta oni elspezis pli ol 1.2 milionoj da sikloj por ĝia konstruado.

CENTRO SIVRON estas nova registrita ortodoksa grupeto, sekvo de la (foja) "L'Institut de Poésie Economique" en Jerusalemo. Nia vojo ne estas tiel "klara kaj rekta kaj tre difinita" kiel Zamenhof siatempe poemis, sed ni estas Ortodoksa Klubo de Esperantaj Judoj - (OKEJ) kaj konvinkitaj ke Dio kreis la Mondon, kaj preskaŭ ĉion kio troviĝas en ĝi.

La Purigita Lingvo, la "SAFA BRURA" de Sefanja 3:9, estas termino kiu tre similas la grekajn vortojn DOKSA ORTHOS, kaj ni prezentos la judismon, ĉefe ĝiajn internaciajn instruojn, laŭ la "halakha" kaj laŭ la miljara RABENA tradicio. Judismo estas heredaĵo (aŭ se vi volas: trezorejo), kaj nia **esperanta** lingvo fontas el tre origina spirito - do neniel ia "papagaĵo".

La popoloj havas SAĜON, sed Israel havas TORAON - la ILO per kiu la mondo estis konstruita - diras la Talmudo. Pro la similecoj de la vortoj ni "sivrone" esperas ke partoprenante en *Asist-ILO* ni povos iom montri la esencan de tiu toraa **PaRaDiSo** (Pŝat/evidenta, Remes/aluda, Draŝ/klarigita, Sod/sekreta). Ĉio tio kio estas instruenda (-inda kaj ankaŭ -ebla) en kaj al la mondo, jen nia hejmo-planedo.



Jen provizora teksto de nova teorio - "Ordo en Ĥaoso - La Religia Kampteorio" - kies senmalnetado kaj pliampleksigo dependas de via afabla kunlaboro. Legu la 50 paĝan (21 cm) kajeron kaj aldonu viajn vidpunktojn kaj kromajn faktojn konatajn de vi - el via religia horizonto (10 gld.)

Esperanto ==> ELSPEZOJ

Por ke nia laboro glate kaj efike funkcii ni kompreneble bezonas monajn rimedojn. Ĉiu afabla kontribuo al nia UEA-konto ECJE-T estas gravega financa helpo varmege bonvenigita (kaj certu - tre utile uzota!)



JEN NIA ADRESO POR KORESPONDADO:
Pk 231 80, IL-91 231 JERUSALEM,
Israel. (ישראל - ירושלים)
Eblas mendi nian bultenon *JEBUTO*
kaj eldonaĵojn el nia prospekto.



Estimataj legantoj

dise en la mondo!
Feliĉa mi estas ke mi lernis la francan kaj krome esperanton kaj tiel povas partopreni en la laborado de ASISTI kaj en nia revuo Asistilo.

Multe mi havas por diri kaj tielektas miajn vortojn (iom dense skribante). En la libro Jeremia (10:11) subite aperas sola ARAMEA frazo: "Diru do al ili: - La Dioj, kiuj ne kreis la ĉielon kaj la teron, pereos de sur la tero kaj sub la ĉielo". Lau la antikva juda kredo oni substrekas la **Unueca** en la Dio - nia mondo estas ankaŭ unua, kaj sur ĝi ni devas vivi en paco kaj harmonio. Kiu trovis la veron

- F E L I Ĉ U !

Jeremi Gishron

UJO UJO UJO Mia



Nuntempaj spiritaj mesaĝoj

« Kristanoj, hebreatoj aŭ mahometanoj
Ni ĉiuj de Di' estas filoj. »

(Zamenhof)

En mia lasta artikolo mi skribis : « laŭ la Zamenhofa deziro, spiritaj mesaĝoj gvidas homaron al unuiĝo, (speciale al) la jud-kristan-islama unuiĝo, al kiu jam sopiris nia Majstro Zamenhof : vere, tiel proksimaj estas la fontoj de tiuj ĉi tri religioj, ke nur perversaj rivalecoj disigis ilin ĝis tragikaj malamikecoj. »

Hodiaŭ, mi deziras helpi la leganton al ekkonsciiĝo pri la radika komuneco inter la kredoj kristana kaj islama ; radika, tio estas tia kia ĝi aperas sub ĝiaj praaj formoj : en la Korano unuflanke, en la Agoj de la apostoloj antaŭ la alveno de Saŭlo aliflanke.

Se vi konsentos relegi tiujn tekstojn ĝis profunda ekkono, vi intimiĝos kun la komuna fido al la kreinto kiu instruis sian popolon per profetoj kaj moroj, al la Dio de Abraham, kiu post Moseo sendis Jesuon, kaj post lia morto relevas lin : « Allah diris : Ho Jesuo, mi igos vin morti kaj levos vin al Mi. » (Korano 3,56)

Kristanoj, hebreatoj aŭ mahometanoj, de jarcentoj Dio vokas nin en la saman aventuron. Reĝu en niaj koroj kaj manoj Lia sankteco por ke ni faru Lian Volon.

(sekvote)

François Degoul

(Pagita anonco)

(Interŝanĝaj anoncoj)

LA JAPANA BUDHANO
N-ro 275 NOVEMBRO-DECEMBRO 1994
ENHAVO

夜の間違い電話	石黒 漢子	1
Pri Atombombo en Nagasaki	TAKAHARA Ken	2
Doŭgen parolis jene (3)	Okcidento	3
投稿	西 泰宏	9
辞典の経過	西 泰宏	10
仏教辞典のための予備調査 PIVより	西 泰宏	13
仏教聖典についての思い出	脇坂 智証	20
忙という字	編集者	24
目次. El Redakcio		25

LA KANCERKLINIKO
Politika, Kultura, Skandalema, Ajnista

"La mondo ŝanceliĝas"
Nia Klinikon plu staras"

5 n-roj jare - 115 FF
(specimeno kontraŭ 3 L.R.K.)

Direktoro/Redaktoro : J. LE PUIL
"Les Cocherats" F-18210 THAUMIERS
(pĉk Paris 12 729 73 X (aŭ UEA klik-g))

La Kosmologio
de Martinus

Logika vivklarigo kiu kondukas al
pozitiva vivsinteno - kaj al pacaj
kaj harmoniaj rilatoj inter homoj.
Legu pri la kosmologio en la nova
revuo KOSMOS.
Petu senkoston provekzempleron
ĉe Martinus-Instituto, Mariendals-
vej 96, DK-2000 Kopenhago F,
Danio. ☎ +45 3834 6280 - Fakso
+45 3834 6180

Nenia unuiĝo aŭ membreco